

SOMERO 2003

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

2003:3-4

## Bonvenon al Svedio!

*Välkommen till Sverige!*

2003  
88-a  
UNIVERSALA KONGRESO  
DE ESPERANTO  
Göteborg



*Velboatoj partoprenas en la konkurso "Tjörn runt" (Ĉirkaŭ la insulo Tjörn).*

*Foto: Kjell Holmner, Göteborg & Co*

## LA ESPERO

*Organ för Svenska Esperantoförbundet*

ISSN 0014-0694  
Somero 2003 • 91-a jarkolekto  
Fondita en 1913

**Redaktion:** Leif Nordenstorm

**Frågor om prenumeration o. dyl.:**  
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

**E-post:** [nordenstorm@hem.utfors.se](mailto:nordenstorm@hem.utfors.se)

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

**Tryck:** Al-fab-eto, Skövde

**Prenumeration 2003:** 200 kr.  
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00

**E-post:** [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)  
**Nätsida:** [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 2003:**  
Direktansluten medlem 200 kr.  
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.  
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

**Telefon:** 08 - 34 08 00

**Postgiro:** 578-5

**Nätsida:** [www.esperanto.se/eldona](http://www.esperanto.se/eldona)

**Telefontid:** Samma som Esperanto-Centro Stockholm.  
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

**Styrelsens ordförande:** Agneta Emanuelsson

### Manus till *La Espero*

sänds till Leif Nordenstorm

Järnvägsgränd 11

961 76 Boden

tel. 0921-123 54

e-post: [nordenstorm@hem.utfors.se](mailto:nordenstorm@hem.utfors.se)

När kommer *La Espero* 2003?

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 5	7 augusti	8 september
Nr 6	17 oktober	17 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## NI PREZENTAS

# Lennart Svensson



*Kie vi naskiĝis?  
Kie vi nun loĝas?*

Mi naskiĝis en Lesjöfors... eble en akuŝejo en Filipstad en 1945. Mi loĝis la unuajn 17 jarojn en Lesjöfors, sed ankaŭ en Hagfors, Jakobsberg, Forshaga kaj Filipstad. Mi ne havas gefratojn. Mia gepatra hejmo estis renkontigejo ne nur por la parencoj, sed ankaŭ por lernejoj amikoj, kies gepatroj ofte estis laboremigrintoj el Svedio kaj el eksterlando. Oni edukis min tre libere kaj donis al mi nur unu regulon: kion ajn vi faras, vi devas mem respondi pri via agado.

*Pri kio vi laboras?*

Mi faras nun diversajn laborojn... La oficiala estas Bon'Apetito, la manĝejo en Esperanto-Gården, kiu ekde nun nomiĝos Esperanto-Domo en Esperanto. Tie mi estas kuiristo-bakistokelnero-telerlavisto-purigisto k.t.p.

La dua estas gastiganto aŭ estro de Esperanto-Gården kaj informisto pri Esperanto por la gastoj en Esperanto-Gården...

La trian laboron mi havas ĉar mi bezonas monon. Mi laboras kiel subflegisto, kiam iuj dungitoj estas malsanaj.

*Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?*

Se mi havus liberan tempon ... konstrui mian naskiĝdomon. Eble ĝi estos loĝebla la venontan vintron.

*Ĉu vi havas familion?*

Mi vivas kune kun Barbro ekde 1968

*De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*

Post radia programo en 1980. La programon faris la Malmö Esperanto-klubo, sed jam en 1956, kiam mi vendis la gazeton Dagens Nyheter. Iun dimanĉon mi legis leteron publikigitan en la gazeto. La skribinto opiniis ke lernejoj studu Esperanton kiel la unuan lingvon. Mi pri tio demandis ĉe mia instruisto, kiu tamen ne subtenis Esperanton.

En 1980 mi fine interesiĝis kaj membriĝis en UEA kvankam mi ne sciis la lingvon. Poste mi partoprenis studrondon en Hällefors kaj kurson en Nordiska folkhögskolan (Nordia popola altlernejo) en Kungälv. Gvidis ĝin Anna-Maria Lange. Mi renkontis i.a. Märta Andréasson kaj ŝian fratino Majken. En Karlskoga mi poste partoprenis oksemajnan kurson.

*Ĉu vi havis aŭ havas iujn postenojn en la Esperanto-movado?*

Ekde 1988 ĝis 1990 mi estis lotierestro por Espero-loterioj. La loterioj ampeksis 5000 lotojn. La unua finvendiĝis. Mi mem vendis ĉirkaŭ 2800 lotojn. Mi ne povis same aktive vendi la du sekvantajn loteriojn. Dank al' la gajno de la loterio Sveda Esperanto-Federacio povis pruntedoni monon al Eldona Societo Esperanto por eldoni sved-esperantan vortaron.

*Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?*

Mi havas nigran hundon Tjabo (ĉabo) tre konata en Lesjöfors sed ankaŭ de infanoj kaj partoprenantoj dum la somerkursoj en Lesjöfors.

# Ĝeneralaj faktoj pri Svedio

## FAKTOFOLIO DE SVEDA INSTITUTO

Sveda Instituto (SI) estas ŝtata aŭtoritato kun la tasko eksterlande informi pri Svedio. La instituto eldonas nombron da publikajoj pri diversaj svedaj sociaj sferoj en diversaj lingvoj. La tekstoj sur p. 3-5 ĉefe estas parto de la informproduktaĵo de SI kaj oni rajtas uzi ĝin kiel referencan materialon, kondiĉe ke oni indikas la fonton. Esperantigis kaj iom kompletigis: Leif Nordenstorm. Lingve konsilis Bertil Nilsson kaj Gunnar Gällmo.

Reviziita versio aperos en la hejmpaĝo de SI: [www.si.se](http://www.si.se)

La teksto aperis ankaŭ en Vikipedio en la interreto.

### Granda lando, varia klimato

Svedio estas granda lando – en Eŭropo nur Rusio, Ukrainio, Francio kaj Hispanio estas pli grandaj. La distanco de nordo al sudo estas 1600 kilometroj, kio egalas al la distanco Berlino-Moskvo aŭ Nov-Jorko-Minneapolis. En la nordo la vintroj estas longaj, malvarmaj kaj neĝoriĉaj, sed dum la mallongaj someroj la meznokta suno brilas la tutan tagnokton. En la sudo la vintroj estas konsiderinde malpli severaj kaj la someroj pli longaj.

Pli ol duono de la surfaco de Svedio estas kovrita de arbaro, plejparte konifera arbaro kun riĉa bestaro. Ĉirkaŭ 100 000 lagoj donas vivon al la pejzaĝo. Ekster la longaj bordoj de la Balta maro oriente kaj la Norda maro okcidente estas arkipelagoj kun dek-miloj da ŝeroj. Svedio havas landlimojn al Norvegio kaj Finnlando. En 2000 estas inaŭgurita la sunda Ponto inter Malmö kaj Kopenhago, kaj Svedio pliproksimiĝis al Danlando kaj al la eŭropa kontinento.

### Malgranda loĝantaro, multaj novaj svedoj

La granda lando havas malgrandan loĝantaron, ĉ. naŭ milionoj. 85 procentoj de la enloĝantoj loĝas en la suda duono de Svedio, kun granda koncentriĝo al tri urboj: la ĉefurbo Stokholmo (1,7 milionoj kun antaŭurboj), Gotenburgo ĉe la okcidenta bordo (800 000) kaj Malmö en la sudo (500 000).

Svedio longtempe estis etne homogena lando. Antaŭ la komenciĝo de la dua mondmilito la sameoj (laponoj) estis la ununura, klare difinita malplimulto en la lando. Hodiaŭ ĉ. 20 procentoj de la loĝantoj havas eksterlandan devenon, tiel ke ili aŭ naskiĝis ekster Svedio aŭ ke minimume la patro aŭ la patrino naskiĝis eksterlande.

Nur dum kaj post la dua mondmilito la enmigro pligrandiĝis. Svedio akceptis grandan nombron da rifuĝintoj dum la militaj jaroj kaj ankaŭ poste malfermis siajn limojn dum politikaj krizoj en aliaj landoj. Nur en 1992 estis akceptitaj 84 000 homoj, la plejmulto el eksa Jugoslavio.

### Lingvo kaj religio

La sveda lingvo apartenas al la norda grupo de la ĝermana lingva familio kune kun la norvega, dana, islanda kaj feroa lingvoj. En Finnlando, kiu dum sescent jaroj estis parto de Sve-

dio, 300 000 homoj parolas la svedan kiel gepatran lingvon.

En la 16a jarcento Svedio nuligis la rilatojn al la romkatolika eklezio kaj poste dum pli ol kvar jarcentoj, havis evangelian luteranan ŝtatan eklezion. La 1an de januaro 2000 la Sveda eklezio sendependiĝis kaj egaliĝis al la aliaj religiaj komunumoj. En 1999 apartenis al la Sveda eklezio 84 procentoj de la loĝantaro.

### Parlamentismo kaj monarĥio

Svedio estas parlamentisma demokratio. La parlamento, "Riksdagen", havas unu ĉambron kun 349 lokoj. Regula balotado okazas ĉiun kvaran jaron kaj la voĉdonrajtiga aĝo estas 18 jaroj. La lokoj en la parlamento dividiĝas proporcie inter la partioj, kiuj ricevas ne malpli ol 4 procentojn de la donitaj balotoj.

La socialdemokrata partio formis la registaron dum la plej granda parto de la tempo post la dua mondmilito. Dum la periodoj 1976-82 kaj 1991-94 la landon regis "burgaj", nesocialismaj registaroj. Post la balotado en 1998 Svedio havas socialdemokratran malplimultan registaron, kiu en multaj sferoj kunlaboras kun la Maldekstra partio kaj kun la Verduloj. La socialdemokratoj je la balotado de 2002 ricevis 39,8 procentojn de la balotoj kaj la dua partio, la Konservativa partio ricevis 15,2 procentojn. La nombroj de la ceteraj kvin partioj estis: Popola partio (liberaluloj) 13,3 procentoj, Maldekstra partio 8,3 procentoj, Kristdemokrata partio 9,1 procentoj, Centra partio 6,1 procentoj kaj la Verduloj 4,6 procentoj. Ĉefministro estas Göran Persson.

La sveda monarĥio estas konstitucia. La devoj de la reĝo kiel ŝtatestro estas ĉefe reprezentaj kaj ceremoniaj. La nuna reĝo Karlo XVI Gustavo (Carl XVI Gustaf) naskiĝis en 1946 kaj apartenas al la dinastio Bernadotte kun radikoj en Francio. Reĝino Silvia estas filino de germana komercisto kaj lia brazila edzino. Plej proksima al la trono estas kronprincino Victoria, naskita en 1977.

### Multaj militoj, longa paco

Svedio havis la favoron vivi en paco dum preskaŭ 200 jaroj. Sed dum multaj jarcentoj antaŭe la lando partoprenis en fortokonsumantaj konfliktoj kaj longedaŭraj militoj. Vikingoj el Svedio kaj el ceteraj nordiaj lan-

doj vojaĝis, ekde ĉirkaŭ la jaro 800 kaj dum 250 jaroj poste, al fremdaj landoj en vojaĝoj kiuj estis kombinaĵo de komercado, rabado kaj elmigrado.

La sveda regno formiĝis dum la 12a jarcento. Ĝis la 16a jarcento la limoj inter la nordiaj landoj estis malfastabilaj. Dum periodo en la 14a jarcento Svedio, Norvegio kaj Danio estis unuigitaj en union. Svedio jam antaŭe aneksis Finnlandon. La fundamento de moderna Svedio estis konstruita en la 16a jarcento. Dum la sekva jarcento Svedio evoluis al eŭropa grandpotenco kun kolonioj ĉirkaŭ la Balta maro – sed la malgranda lando estis tro malfortika bazo por grandpotenca regno, kaj la potenco de Svedio konstante malkreskis.

Sekvis pliaj malsukcesoj. Post milito kontraŭ Rusio en 1808-1809 Svedio devis forlasi Finnlandon. La unuo, en kiu Svedio kaj Norvegio estis partoj ekde 1814, dissolviĝis en 1905. Svedio partoprenis nek en la unua nek en la dua mondmilito, kaj daŭrigis sian neŭtralan politikon ankaŭ post la paciĝo en 1945. Senalianceco en paco, celanta al neŭtraleco en milito – tio fariĝis la oficiala doktrino de Svedio. En 2001 la partioj de la parlamento komencis interparolojn pri "nova sekurecpolitika doktrino, alĝustigita al nova situacio."

Ĉiam estis forta sveda ambicio aktive partopreni en internacia kunlaboro. Forta sveda engaĝiĝo en UN estas fundamento en sveda ekstera politiko. Kun la ceteraj nordiaj landoj – Danio, Finnlando, Norvegio kaj Islando – Svedio havas proksiman kunlaboron en la plej multaj sferoj.

### Novaj rilatoj kun la mondo ĉirkaŭanta


La renversoj en Eŭropo dum la jaroj 1989-91 necesigis ampleksan revizion de la sveda ekstera politiko. La disfaloj en la komunismaj diktaturoj kaj la dissolviĝo de Sovetio kreis situacion, kiu malfermis novajn vojojn por la rilatoj inter Svedio kaj la mondo ĉirkaŭanta. En 1991 Svedio kandidatiĝis pri aliĝo al la Eŭropa Unio (EU), kaj en 1994 oni interkonsentis pri sveda membreco. Post referendumo Svedio aliĝis al EU la 1an de Januaro 1995. Kiam la eŭropa mona unio (EMU) ekfunkciis la 1an de Januaro 1999, Svedio elektis ne partopreni tuj, sed ne neis estontan partoprenon. La demando estos decidita post referendumo.

## La defendaj fortoj algustigas al nova situacio

Dum la jardekoj de la malvarma milito Svedio devis konsideri la riskon de invadprovo kontraŭ la bordoj de la lando je konflikto inter Varsovia Pakto kaj Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). La cirkonstancoj ŝanĝiĝis post la malfondo de Varsovia pakto kaj la disfalo de Sovetio.

La defendaj fortoj, bazitaj sur ĝenerala militservo por viroj, nun estas malpli grandaj ol antaŭe. Parlamenta decido de la jaro 2000 signifas, ke la nombro de taĉmentoj malkreskas, sed la kvalito kaj la fleksebleco kreskas. La aerarmeo nun havas centran rolon. Estas preteco por sveda partopreno en internacia kontribuado por traktado de krizoj. Dum la pasintaj jaroj pli ol 60 000 svedaj soldatoj servis kiel UN-soldatoj en diversaj lokoj en la mondo.

Oni diskutis pri membreco en NATO, sed ĝi ne estas aktuala en la nuna situacio. Svedio aktive partoprenas en Partnereco Por Paco (PPP) kaj en la pacigaj taĉmentoj en eksa Jugoslavio.



Götaplatsen kaj Avenuo — la absoluta centro de Göttenburgo, la urbo de la 88-a Universala Kongreso de Esperanto. (Fotis Kjell Holmner/Göteborg&Co)

## Malriĉa lando riĉiĝis

En la mezo de la 19a jarcento Svedio estis unu el la plej malriĉaj landoj de Eŭropo. 70 procentoj el ĝia loĝantaro estis terkulturistoj. Iom pli ol unu jarcenton poste la lando estis unu el la plej riĉaj kaj plej industriigitaj en la mondo, kaj nun nur 2 procentoj laboras pri terkulturado.

Dum la jardekoj post la dua mondmilito la sveda ekonomio bone evoluis. La brutta nacia produkto (BNP) kreskis, la lando prosperis kaj oni povis plifortigi la bonstatan socion. Komence de la 1990-aj jaroj Svedio tamen alvenis al sia plej serioza krizo post la 1930-aj jaroj. La BNP malkreskis, la sveda krono perdis valoron, la senlaboreco kreskegis kaj la nacia ŝuldo timige kreskis. La pozicio de Svedio pri bonstato kompare al aliaj landoj malpliboniĝis.

Oni komencis vastan reordigon de la sveda ekonomio. En la komenco de la nova jarcento la ŝtataj financoj denove tenas sin en ekvilibro. La ekonomia kresko estas relative bona, la inflacio estas moderigita, la ŝtata ŝuldo malpligrandiĝis kaj la realaj salajroj plialtiĝis samtempe kun malplialtiĝo de la senlaboreco. Svedio tre dependas de sia eksporta bilanco. Germanio kaj Britio estas la du plej gravaj komercaj partneroj de Svedio — kaj pri eksporto kaj pri importoj. La sveda produktada industrio plejparte baziĝas sur la plej gravaj enlandaj krudaĵoj: ligno kaj ferferco. La maŝinindustriaj kompanioj, inkluzive la aŭtokompaniojn, respondecas pri pli ol 40 procentoj de la plusvaloro en la sveda industrio. Ligna, paperkaĉa kaj papera industrioj respondecas pri 20 procentoj. La parto de la ĥemia industrio estas ĉirkaŭ 12 procentoj.

La nova informata tekniko ludas ĉiam pli gravan rolon en la sveda ekonomio kaj Svedio, laŭ multaj esploroj, estas unu el la plej gravaj informateknikaj landoj de la mondo. Pli ol ĉiu dua svedo uzas interreton kaj ekzistas pli ol 4 milionoj da portebaj telefonoj.

## Intensa debato pri nuklea energio

Demandoj pri medio ĝenerale estas gravaj en Svedio. Unu el la plej disputvekaj temas pri produktado de energio. Nuklea energio respondecas pri duono de la elektro de Svedio. Post referendumo en 1980 la parlamento decidis, ke ĉiuj nukleaj reaktoroj devos esti malfunkciigitaj en 2010, sed tiu tempoplano estas forlasita. Unu reaktoro estis malfunkciigita en 1999. La daŭra likvidado de nuklea energio dependas de kiel rapide eblas trovi anstataŭigan energion, kiun oni povas produkti sen malpuregi la aeron kaj je akceptebla kosto.

## Evoluinta socialzorga ŝtato

Socialzorga sistemo dum longa tempo donis al Svedio altan profilon en la internacia debato. Svedoj povis atendi ŝtatan subtenon en la plej multaj el la sortoŝanĝoj de l' vivo. La ekonomia krizo de la lando en la komenco de la 1990-aj jaroj devigis la ŝtaton ŝpari, sed kelkaj el la forigitaj socialaj rajtoj refunkciigis, kiam la ŝtataj financoj reekvilibriĝis. La socialzorga ŝtato ĉefe restis nedetruiita.

La kreskanta ono da pensiuloj en la loĝantaro kaŭzas ekonomiajn problemojn en Svedio — kiel en plej multaj aliaj kompareblaj industriaj landoj. La meznombra aĝo kreskis al 76,7 jaroj por viroj kaj 81,8 por virinoj. Nova pensia sistemo, kiu konsi-

deras kaj novajn realaĵojn kaj ekonomian kreskon, ekfunkciis en 1999.

## Egaleco inter la seksoj

Post la balotado en 1998 42,7 procentoj el la svedaj parlamentanoj estas virinoj kaj en la komenco de 2000 virinoj formis la plejmulton en la registaro. En la politika sfero Svedio povas nomi sin monda ĉampiono koncerne la egalecon inter la seksoj. La leĝofarado celas akceli egalecon inter viroj kaj virinoj koncerne ekzemple salajrojn kaj karriereblecojn. La familia politiko instigas de ambaŭ gepatrojn kombini profesian laboron kun komuna respondeco por la infanoj.

## Edukado kaj esplorado

Naŭjara fundamenta lernejo estas deviga; la lernejo komenciĝas je aĝo de ses aŭ sep jaroj. Plej multaj infanoj frekventas senkostajn komunumajn lernejojn. Preskaŭ ĉiuj (98 procentoj) plustudas en trijara gimnazio kun kaj teoriaj kaj praktikaj programoj. Finstudinte en la gimnazio pli ol triono daŭrigas sian studadon en universitatoj. La celo estas, ke tiu ĉi ono kresku al duono. La tuta sveda esplorado kaj evoluo sumiĝas je 3,8 procentoj de BNP, la plej alta cifero inter la memrolandoj en Organizaĵo por Ekonomia Kooperado kaj Evoluo.

## Preslibereco kun tradicio

La unua leĝo pri preslibereco en Svedio estis akceptita jam en 1766. La nuna leĝo celas faciligi por la amaskomunikilo plenumi sian ekzamanan rolon en la socio. Ĉiuj oficialaj dokumentoj estas haveblaj por la ĝenerala publiko, kun kelkaj tre malmultaj detale difinitaj esceptoj. Cenzuro estas malpermesata, kaj ĉiuj kiuj donas informojn al amaskomunikilo estas nepuneblaj, la esceptoj estas malmultaj ankaŭ en tiu ĉi rilato. La amaskomunikila situacio rapide ŝanĝiĝas. La gazetoj tamen relative bone gardas sian pozicion en la konkurenco kun novaj komunikiloj. La svedoj apartenas al la plej gazetlegantaj popoloj en la mondo

## Kreskanta turismo

La kreskanta turismo en Svedio grandparte baziĝas sur la relative nedifektita naturo kaj la bonaj eblecoj de eksterdoma restado kaj distriĝo. La tradicia sveda rajto libere iri en arbaroj kaj sur alia tero inkluzivas kaj enloĝantojn kaj vizitantojn. Ĝi tamen postulas gardemon kaj respekton al la naturo kaj al la terposedantoj. Plej multaj turistoj venas el la nordiaj landoj, sed la germanoj respondecas pri la plej granda nombro da tranoktadoj. Ĉiam pli granda nombro da germanoj, same kiel norvegoj kaj danoj, aĉetas somerdomojn en Svedio.



VARVARA 2002. Astrid Lindgren.

La portreto de Astrid Lindgren estas farita de Varvara Bondina el Minusinsk el Siberio. La ilustraĵoj pri la herooj de Astrid ne tute similas al la ilustraĵoj al kiuj kutimiĝis svedoj. Tio memorigas nin pri tio ke Astrid Lindgren ne nur estas sveda verkistino, sed ankaŭ internacie konata verkistino. Varvara kaj ŝia edzo Sergej Bondin partoprenis en la Esperantokongreso en 1992 en Oskarshamn. Sergej partoprenis en artekspozicio kaj ankaŭ studis en la Popola altlernejo de Oskarshamn.

## Konataj svedoj

**Abba** dum la 1970-aj jaroj komencis internacie sukcesplenan epokon por sveda popmuziko, kiu fariĝis grava eksporta produkto. Kiam Abba dissolviĝis en 1982 la diskoj de la ensemble vendiĝis en 250 milionoj da ekzempleroj.

**Ingmar Bergman**, n. 1918, teatrotristo kaj filmkreinto, produktis 40 filmojn dum la jaroj 1946-82. "Somernokta

rideto" konatigis lin internacie. Lia lasta filmo estis "Fanny kaj Alexander". Lia teatra laboro pludaŭras.

**Ingrid Bergman**, (1915-1982) venis al Holivudo en la komenco de la 1940-aj jaroj. Ŝia hodiaŭ plej konata filmo estas "Casablanca" (1943), en kiu ŝi aktorin kun Humphrey Bogart. Ŝi ricevis tri oskarojn.

**Jussi Björling**, (1911-60) unu el la plej famaj tenoruloj de la mondo, debutis en la Operejo en Stokholmo ankoraŭ ne havante 20 jarojn. Li poste faris grandan internacian karieron.

**Björn Borg**, n. 1956, nomita la plej fama sveda sportisto de la 1900-aj jaroj, fariĝis historia tenisisto i.a., ĉar li gajnis la Wimbledon-konkurson dum kvin sinsekvaj jaroj.

**Greta Garbo** (1905-1990), "La dia", naskiĝis kaj entombiĝis en Stokholmo. Ŝi debutis en Holivudo en 1926. Ŝiaj beleco kaj voĉo faris ŝin unu el la plej grandaj publikmagnetoj en la filmhistorio.

**Dag Hammarsköld** (1905-1961) estis ĝenerala sekretario de UN ekde 1953 ĝis sia morto en aviadilakcidento dum tasko en la nuna Zambio. Li havis la ambicion doni al UN aktivan rolon dum internaciaj krizoj.

**Valdemar Langlet** (1872-1960), ĵurnalisto, verkisto kaj esperantisto. Li faris longajn vojaĝojn, i.a. surĉevalo en Rusio kaj Hungario. En Budapeŝto li laboris dum 14 jaroj kiel instruisto pri la sveda, kaj tie li dum la dua mondmilito savis dekmilojn da homoj, ĉefe judojn, de nazia deportado.

**Astrid Lindgren** (1907-2002) estis unu al la plej konataj svedoj kaj eble la plej amata. Ŝiaj libroj por infanoj estis tradukitaj al pli ol 60 lingvoj kaj donis materialon al pli ol 40 filmoj. Pipi Ŝtrumpolonga fascinis infanojn en la tuta mondo.


**Alfred Nobel** (1833-96) inventis la dinamiton, kio famigis kaj riĉigis lin. Li donacis la plej grandan parton de sia riĉaĵo al fonduso, el kiu oni prenas monon por la Nobelaj premioj, kiuj disdoniĝas en Stokholmo kaj Oslo la 10an de Decembro ĉiujare, la mortotago de Nobel.

**Olof Palme** (1927-1986) la internacie plej konata politikisto de Svedio. Ĉefministro 1969-76 kaj 1982-86, estro de la socialdemokratoj ekde 1969 ĝis sia morto. Li mortpafiĝis surstrate en Stokholmo. La murdo ne estas solvita.

**August Strindberg**, (1849-1912) estas tradicie rigardata kiel la giganto en sveda literaturo. Lia grandega produktaĵo ampleksas ĉiujn ĝenrojn. Eksterlande li estas plej konata kiel dramverkisto.

**Raoul Wallenberg**, n. 1912, dum la dua mondmilito savis dekmilojn da judoj en Budapeŝto de nazia deportado. En 1945 sovetaĵ militistoj forkondukis lin. Laŭ sovetaĵ informoj li mortis en Moskvo en 1947, sed lia sorto restas necerta.

# La fabelo pri Vestrogotio



*Aperis la klasika libro "La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson" en Esperanta traduko de Sten Johansson. La libron verkis Selma Lagerlöf (1858-1940), Nobelpremiito en 1909. La libron pri Nils Holgersson ŝi verkis kiel legolibron por la lernejo. Ŝi akceptis la taskon i.a. pro ekonomiaj kialoj, sed ĝuste pro tiu ĉi libro Selma Lagerlöf fariĝis ege konata en Svedio. Ŝia portreto aperas sur la antaŭo de la 20-kronaj monbiletoj. Sur la malantaŭo aperas Nils Holgersson fluganta sur ansero super Skanio en la sudo de Svedio. Tie ĉi vi povos legi pri aventuroj en Vestrogotio, la provinco en kiu situas Gotenburgo.*

## Dimanĉe la 9an de oktobro

La anseroj jam forlasis Bohuslondon kaj nun dormis sur marĉo en la okcidenta parto de Vestrogotio. La eta Nils Holgersson supreniris sur la taluson de ŝoseo, kiu tra iris la marĉon, por eskapi de la malseko. Li ĝuste estis okupita serĉante dormlokon, kiam li ekvidis grupeton da homoj almarŝi sur la ŝoseo. Estis juna instruistino ĉirkaŭita de dek du aŭ dek tri infanoj. Ili venis kiel densa aro kun la instruistino meze kaj la infanoj ĉirkaŭ ŝi. Ili interparolis tiel gaje kaj intime, ke la knabo ekemis akompani ilin kelkan tempon por aŭskulti, kion ili diras unu al la alia.

Tion li facile povis fari, ĉar kuran-te en la ombro ĉe la vojrandoj, li estis preskaŭ nevidebla de ĉiu ajn. Kaj kie dek kvin homoj marŝis antaŭen, regis tia bruo de paŝoj, ke neniu povis aŭdi la gruzon kraketi sub liaj lignoŝuetoj. Por teni la infanojn je bona humoro dum la marŝado, la instruistino rakontadis al ili malnovajn legendojn. Ŝi

ĵus finis unu, kiam la knabo aliĝis al la aro, sed la infanoj tuj petis, ke ŝi rakontu ankoraŭ unu.

"Ĉu vi jam aŭdis la fabelon pri la maljuna giganto el Vestrogotio, kiu transloĝiĝis al insulo fore en la Norda maro?" la instruistino demandis. Ne, tiun la infanoj ne aŭdis, kaj la instruistino komencis.

"Iam okazis en malluma kaj ŝtorma nokto, ke ŝipo pereis ĉe eta ŝero fore en la Norda maro. La ŝipo estis frakasita kontraŭ la bordaj rokoj, kaj el la tuta ŝipano nur du viroj savis sin sur la teron. Ili staris sur la ŝero plene malsekaj kaj rigidaj pro malvarmo, kaj oni facile komprenas, ke ili ege ekĝojis vidante grandan lignofajron flami sur la strando. Ili rapidis antaŭen al la fajro sen penso pri ebla danĝero. Nur venante tute proksimen, ili rimarkis, ke ĉe la fajro sidas terura maljuna batalulo, tiel granda kaj kruda, ke ili ne povis dubi, ke ili renkontis viron el giganta gento.

Ili haltis hezite, sed la ŝtormo el nordo siblis laŭ la ŝero kun terura malvarmo. Ili baldaŭ frostmortos, se ili ne povos varmiĝi ĉe la fajro de la giganto, kaj ili decidis kuraĝi proksimiĝi al li. "Bonan vesperon, Avo!" diris la plej aĝa el ili. "Ĉu vi bonvolus permesi al du maristoj, kies ŝipo pereis, varmiĝi ĉe via fajro?"

La giganto saltis el sia pensado, duone ekstaris kaj elingigis sian glavon. "Kiu estas vi?" li demandis, ĉar li estis maljuna kaj nebone vidis kaj ne sciis, kiaj homoj parolas al li.

"Ni ambaŭ estas vestrogotoj, se vi scivolos," respondis la plej aĝa el la maristoj. "Nia ŝipo pereis en la maro ĉi-ekstere, kaj ni venis surteren frostigitaj kaj duone nudaj."

"Mi kutime ne toleras homojn sur mia ŝero, tamen se vi estas vestrogotoj, estas alia afero," la giganto diris kaj eningigis la glavon. "Tiuokaze vi rajtas eksidi por varmiĝi, ĉar mi mem devenas el Vestrogotio kaj dum multaj jaroj vivis en la granda tumulto de Skalunda."

La maristoj nun sidiĝis sur du ŝtonojn. Ili ne kuraĝis alparoli la giganton, sed silente rigardis lin. Kaj ju pli longe ili rigardis lin, des pli granda li aperis al ili, kaj des pli malgrandaj kaj senfortaj ili mem ŝajnis al si.

"Mi nuntempe havas malbonajn okulojn," la giganto klarigis. "Mi ape-naŭ videtas vin. Alie plezurigus min sperti, kiel vestrogoto hodiaŭ aspektas. Tamen almenaŭ etendu al mi la manon, unu el vi, por ke mi sentu,

ĉu ankoraŭ troviĝas varma sango en Svedio!"

La viroj alterne rigardis la manegojn de la giganto kaj siajn proprajn manojn. Neniu el ili emis provi lian manpremon. Sed ili vidis, ke fera stango, kiun la giganto uzadis por agiti la fajron, restis kuŝanta en la fajro, tiel ke unu fino estis arde varma. Ili levis ĝin per komunaj fortoj kaj etendis ĝin al la giganto. Li kaptis ĉirkaŭ la stango kaj premis ĝin, tiel ke la fero fluis inter la fingroj. "Ho jes, mi sentas, ke ankoraŭ restas varma sango en Svedio," li diris tute kontenta al la konsternitaj maristoj.

Denove iĝis silente kaj kviete dum kelka tempo ĉe la fajro, sed oni komprenu, ke renkonti samlandanojn rekondukis la pensojn de la giganto al Vestrogotio. Unu memoro post alia aperis al li.

"Mi scivolos, kiel statas nuntempe la tumulto de Skalunda?" li demandis la maristojn.

Neniu el la viroj konis la tumulton, pri kiu la giganto demandis. "Ĝi sendube sufiĉe malaltiĝis," unu el ili respondis kvazaŭ prove. Li sentis, ke ne konvenas resti senresponda antaŭ tia demandanto. "Nu ja, nu ja, tiel ja povas esti," la giganto diris kapjesante konfirme. "Ne eblas pli multe atendi, ĉar tiun tumulton mia edzino kaj mia filino kunportis en siaj antaŭtukoj dum matena horo."

Denove li cerbumis provante kolekti siajn memorojn. Li ne tre ĵuse estis en Vestrogotio, kaj pasis kelka tempo, ĝis li sukcesis penetri sufiĉe profunden inter siajn memorojn.

"Sed Kinnekulle kaj Billingen kaj la aliaj etaj montoj, kiuĵ kuŝis disŝutite sur la vasta ebena, ili tamen restas, ĉu ne?" la giganto diris. — "Ja ili restas," la vestrogoto respondis, kaj por montri al la giganto, ke li komprenas, ke tiu estas brava viro, li aldonis: "Eble vi partoprenis starigi unu-du el tiuj montoj, vi Avo?"

"Ho ne, ne ĝuste tiel," la giganto diris, "sed mi povas rakonti al vi, ke vi povas danki mian patron, ke tiuj montoj restas tie. Kiam mi estis eta knabo, troviĝis neniu granda ebena en Vestrogotio, sed kie la ebena nun etendiĝas, situis montovasto, kiu okupis la terenon de Veter-lago ĝis la Gotia rivero. Sed tiam kelkaj riveroj decidis gruzigi la monton kaj porti ĝin suben al Vener-lago. Ĝi ne estis vera granita monto sed konsistis ĉefe el kalkŝtono kaj ardezo, kaj do la riveroj povis facile detruji ĝin. Mi memoras,

ke ili faris siajn sulkojn kaj rivervalojn pli kaj pli larĝaj, kaj fine ili vastigis ilin en ebenojn. Patro kaj mi kelkfoje iris rigardi la laboron de la riveroj, kaj Patro ne estis tute kontenta pri tio, ke ili detruas la tutan monton. 'Ja ili povus almenaŭ lasi kelkajn ripozejojn al ni,' kaj je tio li demetis siajn ŝtonajn ŝuojn kaj metis unu fore okcidente kaj la la alian fore oriente. Sian ŝtonan ĉapelon li metis sur montaltaĵon sur la Vener-strando, mian ŝtonan ĉapon li ĵetis pli foren al sudo, kaj sian ŝtonan klakon li ĵetis sandirekten. Ĉion alian, kiun ni kunportis el bona, malmola ŝtono, li dismetis en diversajn lokojn. Poste la riveroj forlavis preskaŭ la tutan monton, sed la lokojn, kiujn Patro ŝirmis per siaj ŝtonaĵoj, ili ne kuraĝis ataki, do ili restis. Kie Patro metis unu ŝtonon, la monto Halleberg restis sub la kalkanumo kaj Hunneberg sub la plando. Sub la alia ŝtono restis la monto Billingen, la ĉapelo de Patro donis ŝirmon al Kinnekulle, sub mia ĉapo situis Mösseberg, kaj sub la ŝtona klabo kaŝiĝis Ålleberg. Ankaŭ ĉiuj aliaj montetoj sur la Vestrogotia ebena estis konservitaj dank' al Patro, kaj nun mi vere demandas min, ĉu restas en Vestrogotio multaj viroj, kiuj meritas tion da respekto.'

'Ne estas facile respondi pri tio,' diris la maristo. 'Sed indas diri, ke se riveroj kaj gigantoj siatempe estis tiel potencaj, mi pro tio eĉ pli alte estimas la homojn, ĉar nun tamen ili faris sin mastroj kaj de la ebena kaj de la montoj.'

La giganto iomete grimacis. Ne ŝajnis precize, kvazaŭ li tre kontentiĝus pri la respondo, sed li baldaŭ rekomencis la interparoladon. 'Kiel statas Trollhättan nuntempe?' li diris. — 'Ĝi torentas kaj muĝas, kiel ĝi ĉiam faradis,' la maristo diris. 'Vi eble partoprenis ekigi ĝiajn grandajn akvofalojn, same kiel vi partoprenis konservi la Vestrogotiajn montojn?' — 'Ho ne, ne ĝuste tiel,' la giganto diris, 'sed mi memoras, ke kiel knabetoj mi kaj miaj fratoj kutimis uzi ĝin kiel glitejon. Ni ekstaris sur arbotrunko, kaj jen ni ekiris malsupren laŭ la akvofaloj de Gullö kaj Torpö kaj la aliaj tri faloj. Ni ekhavis tian rapidon, ke ni preskaŭ glitis ĝis la maro. Mi demandas min, ĉu nuntempe troviĝas iu viro en Vestrogotio, kiu kutimas tiel amuziĝi?' — 'Ne estas facile scii tion,' la maristo diris. 'Sed mi preskaŭ opinias, ke estas pli mirinda faro, ke ni homoj sukcesis konduki kanalon preter la akvofaloj, tiel ke ni povas ne nur iri malsupren de Trollhättan, kiel vi faris junaĝe, sed krome iri supren per barkoj kaj vaporŝipoj.'

'Estas strange aŭdi tion,' diris la giganto, kaj ŝajnis, kvazaŭ li iomete kolerus pri la respondo. 'Ĉu vi nun krome povas diri al mi, kiel statas tiu regiono fore ĉe la lago Mjörn, kiun oni nomadis la Malsatejoj. — 'Jes, ĝi vere kaŭzis al ni grandan zorgadon,' la

vestrogoto diris. 'Eble vi, Avo, partoprenis elfari ĝin tiel malfekunda kaj senespera?' — 'Ho ne, ne ĝuste tiel,' la giganto diris, 'miatempe riĉa arbaro kreskis sur ĝi. Sed estis tiel, ke kiam mi volis aranĝi nuptofeston por unu el miaj filinoj, ni bezonis multe da bruligno por meti en la bakfornon, kaj tiam mi prenis longan ŝnuregon, volvis ĝin ĉirkaŭ la tutan arbaron de la Malsatejoj, faligis ĝin per unu sola ek-tiro kaj portis ĝin hejmen. Mi demandas min, ĉu hodiaŭ troviĝas iu, kiu povas ŝirfaligi tiom da arbaro per unu fojo?' — 'Jen pli multe, ol mi povas respondi,' la vestrogoto diris. 'Tamen mi scias, ke en mia junaĝo la Malsatejoj kuŝis nudaj kaj malfekundaj, kaj nun la homoj plantis arbaron sur la tutan terenon. Ankaŭ tion mi konsideras kiel viran agon.'

'Nu, sed fore en la suda Vestrogotio, tie sendube neniu homo povas vivteni sin?' la giganto diris. — 'Ĉu vi partoprenis pretigi ankaŭ tiun landon?' la vestrogoto demandis. — 'Ho ne, ne ĝuste tiel,' la giganto diris, 'sed mi memoras, ke kiam ni gigantidoj paŝtis niajn gregojn tie fore, ni konstruis al ni tiom da ŝtonometoj kaj faris la teron tiel mizera per ĉiuj ŝtonoj, kiujn ni ĵetadis unu kontraŭ la alia, ke ŝajnas al mi, ke estus malfacile sarki kampojn en tiu regiono.' — 'Jes, prave estas, ke terkultivado ne donas multan profiton tie sude,' la vestrogoto diris, 'sed la homoj tie komencis pri teksado kaj ligna laboro, kaj ŝajnas al mi, ke pruvas pli da lerto perlabori sian vivtenadon en tiel malriĉa regiono, ol partopreni detrui ĝin.'

'Nun mi scias ankoraŭ nur unu aferon, pri kiu demandi,' la giganto diris. 'Kiel vi aranĝis malsupre ĉe la marbordo, kie la Gotia rivero enfluas la maron?' — 'Ĉu ankaŭ tie vi havis rolon en la ludo?' la maristo demandis. — 'Ne ĝuste tiel,' la giganto diris, 'sed mi memoras, ke ni kutimis iri ĝis la strando, logi al ni balenon kaj rajdi sur ĝia dorso tra fardoj kaj golfoj en la insularo. Mi scivolas, ĉu vi konas iun, kiu kutimas same amuziĝi?' — 'Tion mi ne asertas,' la maristo respondis, 'sed mi konsideras kiel same bravan faron, ke ni homoj konstruis urbon ĉe la Gotia riverbuŝo, el kiu ŝipoj ekiras al ĉiuj maroj de la mondo.' Al tio la giganto nenion kontraŭdiris, kaj la maristo, kiu mem hejmis en Gotenburgo, komencis priskribi al li tiun riĉan komercan urbon kun ĝia vasta haveno, kun ĝiaj pontoj kaj kanaloj kaj pompaj stratoj, kaj li rakontis, ke ĝi posedas tiom da talentaj komercistoj kaj kuraĝaj marvojaĝantoj, ke ili sendube igos ĝin la plej elstara urbo en Nordio.

Je ĉiu ricevita respondo la giganto sulkis la frunton en pli kaj pli profundajn faltojn, kaj oni facile rimarkis, ke li estas sufiĉe malkontenta, ke la homoj faris sin mastroj de la naturo. 'Mi aŭdas, ke estas multaj novaĵoj en

Vestrogotio,' li diris, 'kaj mi volonte reirus tien por reĝustigi unu-du aferojn.' Aŭdante tiujn vortojn, la maristo iom ektimis. Li ne kredis, ke la giganto venos al Vestrogotio kun bona intenco, sed kompreneble li ne kuraĝis montri tion. 'Vi povas esti certa, Avo, ke vi estos akceptita kun honoro,' li diris. 'Ni sonorigos por vi per ĉiuj preĝejoj sonoriloj.' — 'Ĉu do restas preĝejoj sonoriloj en Vestrogotio?' la giganto diris kun hezita tono. 'Ĉu ili ne difektiĝis pro sonorado, la grandaj sonoriloj de Husaby kaj Skara kaj Varnhem?' — 'Ne, ili ja restas, kaj ili ricevis multajn fratinojn post via tempo. Nun troviĝas neniu loko en Vestrogotio, kie oni ne aŭdas preĝeajn sonorilojn.' — 'Tiuokaze mi sendube devos resti, kie mi estas,' la giganto diris, 'ĉar ĝuste pro tiuj sonoriloj mi migris de hejme.'

Li nun profundigis en pensojn, sed baldaŭ li denove turnis sin al la maristoj. 'Nun vi povas trankvile kuŝiĝi por dormi ĉe la fajro,' li diris. 'Morgaŭ matene mi aranĝos tiel, ke preteriros ĉi tie ŝipo, kiu akceptos vin kaj prenos vin hejmlanden. Sed pro la gastamo, kiun mi montris al vi, mi petas de vi nur tiun komplezon, ke vi iru al la plej bona viro, kiu troviĝas en Vestrogotio, tuj reveninte hejmen, por doni al li ĉi tiun ringon. Transdonu al li saluton de mi, dirante, ke se li portos ĝin surfingre, li estos multe pli ol li nun estas!'

Tuj reveninte hejmen, la maristoj iris al la plej bona viro de la tuta Vestrogotio kaj donis al li la ringon. Sed li estis tro prudenta por tuj surfingri ĝin. Anstataŭe li pendigis ĝin sur etan kverkon, kiu kreskis en lia bieno. Tuj la kverko komencis kreski tiel rapide, ke ĉiuj tion rimarkis. Ĝi elpuŝis ŝosojn kaj disetendis branĉetojn. La trunko dikiĝis, la ŝelo malmoliĝis. La arbo ricevis novajn foliojn kaj faligis ilin, ricevis florojn kaj fruktojn kaj post kelka tempo iĝis tiel granda, ke neniu iam vidis pli enorman kverkon. Sed apenaŭ plenkreskinte, ĝi samrapide ekvelkis, la branĉoj falis, la trunko kaviĝis, kaj la arbo humiĝis, ĝis baldaŭ nenio restis el ĝi krom radikstumpo.

Tiam li, kiu estis la plej bona viro de Vestrogotio, ĵetis la ringon foren. Tiu donaco de giganto estas tia, ke ĝi donas al viro grandajn fortojn kaj igus lin post mallonge pli elstara ol ĉiuj aliaj,' li diris. 'Sed ĝi igus lin trostreĉi sin, tiel ke baldaŭ lia kapablo kaj feliĉo elĉerpiĝus. Mi ne volas uzi ĝin, kaj mi esperas, ke neniu trovos ĝin, ĉar ĝi ne estas sendita ĉi tien kun bona intenco.'

Tamen ne maleblas, ke la ringo estas trovita. Ĉiam, kiam bona viro streĉas sin super sia kapablo por fari utilon, oni povas demandi sin, ĉu li trovis la ringon, kiu devigas lin labori tiel, ke li konsumas sin tro frue kaj devos lasi sian verkon nefinita.'

# Nationalspråk och internationella språk

Daniel Tarschys, politikisto, iama ĝenerala sekretario de Eŭropa konsilio kaj profesoro pri politika scienco, verkis tiun ĉi antaŭparolon por svedlingva libro "Doktoro Zamenhof kaj la internacia lingvo".

**I dagarna kommer boken "Doktor Zamenhof och det internationella språket" ut på Esperantoförlaget. Den är skriven av Leif Nordenstorm. La Espero kan redan nu publicera bokens förord, skrivet av Daniel Tarschys.**

Runt hela världen har språkfrågor blivit eldfängda under de senaste två århundradena. Många skärmytslingar utspelas i spänningsfältet mellan nationalspråk och minoritetsrättigheter. Andra rör de språkliga förutsättningarna för internationella kommunikationer. Den omtalade globaliseringen handlar ju inte enbart om ökad världshandel och vidgat ömsesidigt beroende, utan också om allt tätare mänskliga och kulturella kontakter. Här spelar språken en avgörande roll.

Framväxten av distinkta nationalspråk är starkt förbunden med framväxten av distinkta nationalstater. För att skapa politisk gemenskap krävdes det stora investeringar i gemensamma symboler, referensramar och uttrycksmedel. Därmed kom de olika språken att bli centrala beståndsdelar i många och stundom konkurrerande identitetsbyggen.

I det europeiska samarbetet påminns vi oavbrutet om dessa spänningar. Europeiska Unionens lagtexter måste givetvis publiceras på alla nationalspråk, f.n. 11 men snart nästan dubbelt så många. I de politiska församlingarna måste också var och en kunna uttrycka sig på sitt eget lands officiella språk. När tjänstemän träffas är det däremot regel att arbeta på ett eller några få språk. Men alla tendenser till formella inskränkningar stöter på patrull. Mot enspråkmodellen protesterar fransmännen, mot tvåspråkmodellen tyskarna, mot trespråkmodellen italienerna och mot fyrspråkmodellen spanjorerna. Flera länder som väntar i kullissen kommer snart att blanda sig i detta animerade meningsutbyte.

I Europarådet utnyttjas endast två officiella språk, engelska och franska, men därutöver används ytterligare tre som arbetspråk i den parlamentariska församlingen, nämligen tyska, italienska och ryska. Tolkning till an-

dra språk sker i viss utsträckning på de berörda ländernas bekostnad. Europarådet har också engagerat sig i många olika språkfrågor i samband med minoritetskonflikter. Två viktiga konventioner som antagits rör skyddet nationella minoriteter och främjandet av regionala språk och minoritetsspråk.

sådana projekt som har fått någon spridning att tala om. De uppstod nästan samtidigt under det sena 1800-talets guldålder för hopp och framtidstro.

Det första var den sydtyske prästen Johann Martin Schleyers volapük, som under 1870-talet och 1880-talet fick en hjälpsväckande spridning runt om i Europa, också i Sverige. Grammatiskt var språket mycket regelbundet, och ljudmässigt var det anpassat för de asiatiska folk som inte skiljer mellan r och l och för t.ex. finnar och spanjorer som inte kombinerar begynnelse med efterföljande konsonant; därav själva ordet volapük, som var en anpassning av "worldspeak". Ordförrådet byggde på långtgående förenklingar av olika förebilder, men det gav få referenspunkter och var därför mycket svårt att bemästra.

Strax efter volapük lanserade den polsk-judiske ögonläkaren Lazar Zamenhof sitt esperanto, som var avsevärt bättre konstruerat med en enkel och konsekvent formlära, lätt igenkännlig vokabulär och vittgående möjligheter till ordbildning genom ett väl utvecklat system av suffix. Medan en volapük-text var obegriplig för den som inte studerat språket

kunde huvuddragen av en esperanto-text förstås av den som kände till några vanliga europeiska språk. Med dessa fördelar trängde esperanto snart ut volapük och blev därmed det dominerande konstgjorda språkprojektet. De alternativ som senare lanserats (såsom ido och interlingua) har fått en mycket begränsad spridning.

Försöken att överbrygga språkkliften och vidga förståelsen över gränserna är ett viktigt stråk i det senaste seklets internationalism. Den idémässiga miljö i vilken esperanto och esperantorörelsen växte fram får en utmärkt presentation i denna bok. Inte minst tecknar Nordenstorm en intressant bild av Zamenhofs egna politiska och religiösa utgångspunkter, av hans förhoppningar och besvikelser. Boken ger också en snabb lektion i språkets uppbyggnad och beskriver dess utbredning och användning.

Daniel Tarschys



Inom stora sammanflätade kulturområden har det alltid utvecklats språk som fungerat som allmänna kommunikationsmedier. Under antiken var grekiskan ett sådant *lingua franca* och senare under lång tid latin. Franskan vann en motsvarande status under 1700-talet, liksom engelskan under 1900-talet. Men sådana tendenser till hegemoni och dominans har alltid givit upphov till starka motreaktioner. Att hävda nationalspråken mot de stora internationellt gångbara tungomålen har varit ett stående nummer på den politiska dagordningen, alltifrån 1500-talets protestantiska bibelöversättningar till dagens franska motstånd mot Hollywood och andra yttringar av anglosaxisk dominans.

Idén om ett neutralt internationellt språk som skulle kunna överbrygga denna sorts motsättningar och samtidigt underlätta mellanfolklig förståelse är minst tusen år gammal, men det är egentligen bara två



# Fela kiraso

*Marie Hermanson naskiĝis en 1956 en Gotenburgo, kie ŝi ankoraŭ loĝas. Ŝi estis ĵurnalisto sed en 1986 debutis kiel beletra verkisto per la novelaro "Det finns ett hål i verkligheten" (En la realo troviĝas truo). Poste aperis pluraj romanoj, kaj ŝi verkis ankaŭ dramojn por televido kaj radio. Plej konataj el ŝiaj verkoj estas la romanoj "Värddjuret" (La loĝato) el 1995, kaj "Musselstranden" (La konka strando) el 1998. En siaj libroj ŝi ofte aludas ian transiron inter la realo kaj alia mondo – fabelo, fantazio aŭ alia dimensio. Ŝiaj verkoj estas tradukitaj al almenaŭ ses lingvoj. Du el ŝiaj noveloj aperis esperante kun noveloj de kvin aliaj aŭtoroj en la kolekto "En la realo troviĝas truo – Nuntempa sveda novelarto" ĉe Al-fab-et-o, 1996. Jen por la UK en Gotenburgo 2003 ni prezentas alian el ŝiaj noveloj.*

Mia nomo estas Lisa Kuniklo. Mi havas verdan felon, grandajn tranĉdentojn kaj longajn okulharojn. Mi estas vestita en rozkolora pufmanika robo kaj blanka antaŭtuko. Inter miaj longaj oreloj mi portas grandan banton. Mia supra makzelo ege elstaras, kaj mi senĉese ridetas. Mia edzo nomiĝas Berg. Ankaŭ li estas kuniklo. Ni havas du infanojn. Ni loĝas en la amuzparko Liseberg en Gotenburgo. Tie ni kutimas vagadi kune kun Avo Kuniklo, la maljuna patro de mia edzo. Ni mansignas, salutas kaj brakumas. Kaj ridetas. Senĉese.

Kiam mi ne estas ĉi tie en Liseberg, mia nomo estas Eva Antonsson. Mi estas 42-jara. Mi havas socialan edukon, sed krom mia portempa kunikla posteno, mi senlaboras. Mi preskaŭ neniam ridetas.

Mia edzo nomiĝas Krister, li estas dungita de medikamenta kompanio. Kion li precize faras, mi ne bone scias. Li tion klarigis plurfoje, sed tio ŝajnas tiel teda kaj komplika, ke mi tuj forgesas. Sed li amas sian laboron kaj ofte deĵoras ĝis malfrue vespere. Ĝuste nun li havas libertempon, kiun li pasigas en kurso sur Korfu. La kompanio pagas. Ni ne havas infanojn.

Ĉi-printempe mi jam proponis min por kvindeko da laboroj. Mi havis kvalifikojn por ili ĉiuj. La sola, por kiu mi ne havis kvalifikojn, estis la kunikla laboro. Laŭ la anonco oni estu 20-30-jara, bone ekzercita, kun unujara teatra eduko aŭ spertoj de distra la-

boro. Neniu trafo, do! Sed la kunikla laboro estis tiu, kiun mi ricevis. Mia unua laboro en du jaroj.

Se esti sincera, la konkurado ne tre severis. Hazarde la ekzamenado okazis samtempe kun provludo de muzikteatro en Scandinavium, grandega spektaklo, kiu bezonis amason da kantistoj, dancistoj kaj statistikoj. Do, tiutage ĉiuj bone ekzercitaj 20-30-jaruloj kun distra ambicio troviĝis tie.

La laboro montriĝis pli postula ol mi supozis. La unuaj tagoj estis infero. Mi havis problemojn moviĝi en la plumpa vesto kaj ofte stumblis. La rigardo-truoj en la muzelo permesas liberan vidon nur antaŭen, ne flanken. La aera truo estas minimuma, kaj mi terure varmiĝas. En la unua tago mi panikis pensante ke mi sufokiĝos. Sed oni alkutimiĝas. Nun la laboro efektive plaĉas al mi.

Kaj mi komprenas, kial oni bezonus aktoran edukon. Ne sufiĉas simple surmeti veston kaj trotadi. Oni ludas rolon. Mi ricevis detalan instrukcion pri la karaktero de Lisa Kuniklo. Amika. Ĝoja. Tenera. Amas sian kuniklan familion kaj ĉiujn infanojn en Liseberg. Ofte flaras florojn. Fojfoje donacas balonojn. Mansignas. Kunfrapas la manojn. Kapjesas. Kapneas. Sed neniam parolas. Lisa samkiel la ceteraj kuniklaj familianoj estas absolute muta.

Post apenaŭ du semajnoj mi sufiĉe bone lernis la rolon, kaj Lisa Kuniklo iĝis pli ol laboro. Ŝi jam estas dua identeco. Malfacilas priskribi, mi ankoraŭ restas Eva, sed mi surmetas la feliĉan, viveman identecon de Lisa super mian propran, turnante ĝin al la mondo. Tra miaj rigardo-truoj mi povas vidi homojn rideti al mi kaj ridi, varme kaj bonvole. Jam pasis longa tempo, de kiam mi renkontis tiajn ridetojn. Mia panjo fojfoje tiel ridetis, kiam mi estis trijara kaj kuris en ŝiajn brakojn. Ankaŭ Krister iam ridetis tiel antaŭ dudek jaroj, kiam ni loĝis ĉiu en sia urbo kaj renkontiĝis ĉe la trajno vendrede vespere.

Mi staras subarbe proksime al la Ĉokolada rado, mansignante al la pasantoj. Estas varmega tago, kaj ĝuste ĉi tie troviĝas iom da ombro. Mia edzo, sinjoro Berg, vagadas malsupre ĉe la Kafotasa karuselo. Li paŝas balanciĝante, kaj la alta ĉapelo svingiĝas tien-reen. Mi mansignas al li, per granda reĝina mansaluto, kaj li amere reciprokas.

Infana ĉareto preterpasas. Larmoj tiklas miajn vangojn, kaj mi ne povas forviŝi ilin. Depost kiam mi iĝis Lisa Kuniklo, mi denove kutimas plori vidante bebojn. Tio iom surprizas min, ĉar mi kredis, ke mi finis tion. Ŝvito kaj larmoj miksiĝas ene de la verda kapo, sed eksteren mi restas ridetanta.

Iu familio staras ĉe la tablo de la Ĉokolada rado, kaj la gepatroj vetas. La infanoj petadas monon, ankaŭ ili volas veti. La gepatroj kolere rifuzas al ili. La infanoj ekkrias kaj la gepatroj riproĉante fortrenas ilin. Ili staras tute apud mi. Ili sonas terurege malicaj, ĉiuj kverelas inter si dirante malbelajn vortojn. Ŝajne ili ne zorgas, ke mi staras tute proksime.

Mi malaprobe skuas mian grandan, pezan kapon. Prefere mi volus krome skui mian verdan montrofingron admone, sed tiu gesto ne apartenas al la esprimaro de Lisa. Neniu aj-aj-aj. Nur oj-aj-aj. Mi memoras, ke Lisa rajtas kunfrapi la manojn, kaj mi nun kunfrapas miajn felajn manojn antaŭbruste en gesto de konsterniĝo. Lisa malesperas. Tiel oni ne kondukas unu al la alia en ŝia familio. Tie oni brakumas.

La familio absolute fajfas pri mi. Estas fascine observi homojn tiel proksime sen embarasi ilin. Kiel Eva Antonsson mi neniam rajtus vidi ĉi tion.

Fine tamen la knabo en la familio reagas. Sen antaŭa averto li subite kuras kontraŭ mi kaj pugnas al mi la ventron. Mi nenion sentas. Mia vesto estas fela kiraso. Sed Lisa Kuniklo ĉaĝreniĝas. Ŝi balancas sian grandan kapon pro malĝojo, ke troviĝas tiaj malicaj infanoj.

Poste mi trotas plu malsupren al la aŭtoj de Avo, kie mi glatumas la kapojn de ĉiuj infanoj en la vico. Kiuj volas, ricevas brakumon. Nun restas nur mallonga tempo de miaj laborhoroj. Mansignante kaj brakumante mi komencas proksimiĝi al la domo, kie ni havas niajn vestejojn.

La tuja rekono trakuras min kiel elektra frapo. Eksteren el la kafeterio venas viro. Li paŝas malrapide kaj singarde direkte al tablo sur la teraso, tenante pleton enmane. Mi ne vidas lin tre bone, senĉese homoj pasas tra mia vidokampo. La viro estas malalta, iom rondventra, havas malhelajn, grize miksitajn harojn kaj mallongmanikan ĉemizon kun verda, nigra kaj viola desegno.

Ene de mia ridanta kapo, granda

kiel plaĝopilko, intense laboras mia propra malgranda kapo. La kapo kaj la okuloj diras malsamajn aferojn. "Ja li estas sur Korfujo, li forveturis la antaŭan lundon, du tagojn antaŭ ol mi komencis la kuniklan laboron. Li forestos dum tri semajnoj, li revenos nur venontan vendredon", diras la kapo.

"Jen li", diras la okuloj.

"Tiu virino ĉetoble, Guste kie li nun metas sian pleton, ja estas absoluta fremdulino. Do li ne povas esti Kristo", rezonas la kapo.

Sed la okuloj obstinas. "Jen li, jen li."

Kaj la kapo devas rezigni kaj eklaboras pri diversaj klarigoj, kiel ĉi tio povas esti. "Io pro la laboro", ĝi diras. Ili sidas apud malalta, rozkolora barilo en la periferio de la kafeterio. Mi plumpas tien. Jen ili sidas malpeze vestitaj en ombro sub terasa sunŝirmilo, dum mi staras fele vestita en la senkompata varmego ekster la barilo. Disigas nin apenaŭ unu metro.

Li havas porcion da elegante aranĝita glaciaĵo, kronita de batkremo kaj tranĉaĵoj el ekzotaj fruktoj. Ŝi havas glason da kolao. Li ĝueme manĝas sian glaciaĵon demandante, ĉu ŝi volas gustumi. Ŝi prenas lian kuleron kaj manĝas el lia glaciaĵo. Poste ŝi redonas la kuleron.

Troviĝas nur du klarigoj, kial plenkreskulo manĝas per kulero, kiun iu alia ĵus havis enbuŝe:

Ŝi estas primitiva sovaĝulo, kiu malhavas ĉiajn nociojn pri la higieno kaj moroj de la moderna okcidenta socio.

Aŭ: ŝi intimiĝis kun la korpo de la alia. Lia salivo ne naŭzas ŝin, ĝi estas familiara al ŝi.

La virino estas vestita en smaragde verda, senmanika silka bluzo kaj blanka pantalonon. Du vicoj da blankaj perloj brilas pale sur ŝia sunbronzita kolo. Ŝi havas zorge tonditan paĝian frizaĵon, kun leĝera ruĝa nuanco de hena en la brunon. La lipoj estas intense ruĝaj, la konturoj markitaj per kraĵono. Tri malsamaj nuancoj de palpebra ŝminko mole kaj modere transiĝas unu en la alian. Ŝi ne estas primitiva sovaĝulo.

Se ne estus pro la kulero, mi eble ne certus. Ili tenas distancon inter si. La interparolo temas pri antaŭtagmeza naĝekskurso sur iu insulo. Ili vidis novan specon de konko, mi ekscias. Mi komprenas, ke ili parolas pri razilaj konkoj, kaj mi preskaŭ klinas min super la barilo siblante inter miaj grandaj tranĉdentoj: "Razila konko, Kristo!" Sed Lisa Kuniklo mutas. Ridetas kaj mutas.

Kristo sunbruliĝis, kiel plej ofte okazas al li. Lia nazo ruĝas. La virino estas delikate bruna.

Ili diskutas ĉu hejmeniri nun aŭ pli malfrue. "Hejmen" evidente signifas ŝian apartamenton. Nur nun ili komencas noti min. Parolante ili rigardas

supren al mi per rapidaj, mallongaj rigardoj. Mi mansignas kaj kapjesas. Kiam ili starigas kaj foriras, mi kelkan tempon restas sekvante ilin per la okuloj. Poste mi sekvas ilin de fore.

Miaj laborhoroj finiĝis. Komencas vesperiĝi, kaj jam hejmeniris ĉiuj infanetoj, kiujn Lisa Kuniklo amas, kaj tiam ankaŭ Lisa kutimas iri hejmen al sia kunikla familio. Sed mi plu vagadas inter la atrakcioj.

Mi amas rigardi la mondon tra la okuloj de Lisa Kuniklo. (Aŭ, se esti preciza, tra ŝia muzelo, ĉar jen troviĝas la rigardo-truoj.) Estas sekure havi la verdan, molan felon de Lisa inter mi kaj la mondo.

Ili jam vizitis la trinkejon. Mi devis atendi ekstere, la kunikloj ĉiam restas eksterdome. Ili sufiĉe longe estis tie. Nun li tenas la brakon ĉirkaŭ ŝi. Li volas veturi per io, li ŝatas tiajn aferojn. Sed ŝi ne volas.

Ili iras en la boskon de Taube, aparta, kvietita loko kun plaŭdanta fontano kaj mallauĉa muziko de Taube el laŭtparoliloj. Ili sidas sur unu el la blankaj benkoj, kaj li turnas sin kontraŭ ŝi, prenas ŝian vizaĝon inter la manoj kaj zorge rigardas ŝin. Poste li kisas ŝin, unue facile kaj tanĝe, poste profunde. Guste tiel, kiel li kutimas. Ŝi tenas la manon ĉirkaŭ lia nuko kaj premas la fortikajn muskolojn. Li havas vere bovan nukon, Kristo, tiuj muskoloj ĉiam ekscitas min.

Mi anserpaŝas ĝis ili. Ili sentas, ke ili ne solas, kaj rigardas supren al mi.

Mi mansignas. Glatumas al ŝi la kapon. Hirtigas la perfektan frizaĵon. Iom incitite ŝi klopodas alĝustigi la harojn, sed mi batpuŝas ŝian etan brunan manon per mia granda verda kaj plusa hirtiga en rondo, ĝis ŝi aspektas kiel trolo.

Kristo ridas. Mi pinĉas al li la nazon. Malfacilas bone kapti per miaj plumpaj felaj fingroj, tamen tio sendube vere doloras, ĉar lia haŭto estas tre sunbruligita. La rido tuj ĉesas, kaj kiam mi lasas la nazon, li tenas manon protekte super ĝi.

Ĉi tio similas certan specon de sonĝo, kiajn mi ofte havis infanaĝe. Ensonĝe mi faris terurajn, malpermesitajn aferojn. Ŝtelis dolĉaĵojn en butiko, pisis sur la klasĉambra planko aŭ kraĉis en la vizaĝon de mia instruistino. Guste la kruda kaj sovaĝa felico el tiuj sonĝoj nun plenigas min. Eŭforia sento de libereco.

Lisa Kuniklo jam laciĝis glatumi kaj mansigni kaj kondukti kiel idioto. Nun ŝi forte ŝiras la ruĝbrunajn harojn de la virino, kaj kiam la apuda viro klopodas malfiksi la verdajn fingrojn, li ricevas baton al la vizaĝo.

Li kaŭras. Li estas surprizita, eble iom timigita, sed la bato ne doloras. Lisa Kuniklo havas ege tro molajn manojn.

Mi turnas min kaj ekiras for. Malantaŭ mi ili parolas indigne. Mi sentas min iel stranga. Mi lopus. La koro

forte batas en mia brusto. Susuras en miaj oreloj. Mi volas agon. Mi faras kion ajn mi volas. Jam finiĝis la ridaĉado kaj mansignado.

Mi stumblas sur io. Laŭ la sono mi komprenas, ke ĝi estas vitra botelo, sed mi ne povas vidi suben. Mi klinas min kaj levas ĝin. Jes, ĝi estas malplena limonada botelo. Tenante ĝian kolon mi reiras al la bosko de Taube.

Ili restas. Ili ankoraŭ sidas surbenke kisante unu la alian. La fontano plaŭdas, kaj el la laŭtparoliloj fluas romantika valsa kanto. Liaj manoj ŝteliras sub la bluzon malkaŝante ŝian brunan dorson. Ŝi faras etan voluptan sonon, kvazaŭ ŝi jam kuŝus kun li. Ni estas tute solaj.

Kun la botelo enmane mi proksimiĝas al la benko. Ili nenion rimarkas. Unue mi batas lian kapon. La botelo dissplitiĝas, kaj antaŭ ol li havas tempon turni sin miadirekten, mi refoje levas la botelon nun disrompitan kaj bategas ŝian ruĝbrunan kapon.

Gapante li turnas sin al mi. Supermezure surprizita. Ŝi sidas tute senmova, paralizita de teruro. Sango fluas laŭ ŝia frunto, ŝia spirado estas rapida kaj vibra, kiel flugilo de ŝvebanta birdo. Malrapide ŝi levas la manon supren al sia kapo, sentas la sangon, kaj ŝia anhelado transiĝas en krian, histerian ploradon.

"Diodamne", li flustras vidante ŝian hirtan, ŝmiritan kapon kaj la ruĝan manon. "Diodamne!"

Mi donas al li plian baton per la akra botela kolo, sed nun li estas preparita kaj protektas sin, tiel ke ĝi anstataŭe trafas lian subbrakon. La virino plorĝemas buliĝante kun la brakoj superkape. Ŝiaj piedoj vestitaj per pintaj sandaletoj saltas suprensuben sur la ŝtona pavimo en terurita piedpinta danco. Ŝiaj piedfingraj ungoj havas precize saman nuancon kiel la lipruĝo.

Subite mi sentas min ege laca. La botelo glitas el mia mano kaj frakasigas ie ĉe miaj piedoj, kie mi ne povas vidi ĝin. Nun mi iros hejmen al mia kunikla familio.

Mi plumpas for, kaj ironite suben laŭ la ŝtupoj, mi stumblas sur miaj propraj piedegoj kaj falas kraŝe surteren. Mia vesto moligas la falon, sed mia granda kapo forflugas kaj surteriĝas kelkajn ŝtupojn pli malsupre.

Mi luktas por restariĝi, sed ne facilas moviĝi en ĉi tiu kostumo. Mi baraktas kiel skarabo, kiu falis surdorsen. Homoj alkuras. Iu ridas kaj iu alia krias. Nun mi memoras la sekvon de tiu infanaĝa sonĝo: La glacian konsciigon kaj la paralizan honton. Kaj la senliman dankemon, kiam mi vekigis kaj komprenis, ke tio estis sonĝo.

Mi volas stariĝi. Mi deziras mian kuniklan kapon. Ŝvito fluas de mi. Ne, mi ne povas turni min kun ĉi tiu korpo, ĝi ne obeas min.

Du uniformitaj gardistoj rigardas suben al mi. Al mia malgranda, ŝvita

kapo en la granda, verda korpo. Kelkaj homoj zorgas pri la sanga virino kaj kondukas ŝin malsupren laŭ la ŝtuparo. Preterpasante min ŝi eligas mekan krieton, kvazaŭ terurita ŝafido.

Krister postsekvas kun mano ĉirkaŭ sia brako. Meze de la ŝtuparo li haltas observante mian vizaĝon. Mi rigardas suben al la kunikla kapo. Jen ĝi kuŝas ridetante kun siaj tranĉdentoj. Mi etendas min al la kapo, sed mi ne atingas ĝin.

Ho, mi volas eniĝi en ĝin! Mi volas eniĝi en la verdan, sintezodoran, varmegan mallumon!

"Eva?" diras Krister. "Ĉu estas vi?"

"Fermu la faŭkon", mi krias, baraktante per la kruoj en lasta vana provo restariĝi. "Mi nomiĝas Lisa Kuniklo. Donu al mi mian kapon!"

Marie Hermanson

El la sveda tradukis: Sten Johansson

*atrakcio*<sup>PIV</sup>: Ĉiu el la logaĵoj de varie-teo, cirko aŭ amuzparko.

*henao*<sup>PIV</sup>: Ruĝbruna kolorigilo de la planto *Lawsonia inermis*.

*lopi*: Pro efiko de drogo perdi kontakton kun la realo (*J. Camacho: La ĉapo de la sterko-vermo*, 1995).

*meki*<sup>PIV</sup>: Bleki kiel kapro aŭ ŝafo.

*razila konko*: *Ensis ensis* Mara konko mallarĝa kaj longa (ankaŭ nomata glavingo, razklino, ensiso).

*Taube*: *Evert Taube*, 1890-1976, sveda kanzonisto.

*trololo*<sup>PIV</sup>: Skandinava supernatura estaĵo de arbaro kaj montoj.



## Kio okazis al Kola Ajayi?

El Vikipedio, la libera enciklopedio, en interreto oni povas legi pri Kola Ajayi, kristana antaŭnomo: Nathaniel (23.4.1906 Warri, Niĝerio, — ?), jorubo, angla ŝtatano, aktoro, esperantista prelegisto. Restadis longe en Usono. Esperantistiĝis 1931 en Bydgoszcz (Fratoj Fethke). Depost 1932 prelegas en Esperanto pri Afriko antaŭ neesperantista publiko. Li havis en Pollando 45 prelegojn en 22 urboj antaŭ 8100 personoj, radiokantadon. En Ĉeĥoslovakujo 33 prelegojn en 21 urboj antaŭ 12 400 personoj (aprilo-majo 1933), du radioprezentadojn. En Jugoslavujo ĉ. 25 prelegojn (junio-septembro 1933).

Ĉu ekzistas iu, kiu scias kio okazis poste? Ĉu Kola Ajayi daŭre okupiĝis pri Esperanto?

La Espero volonte publikigos pliajn informojn. Skribu al la redaktoro.

## Esperantokurso en Julio

Esperantokurso okazos en Färnebo popola altlernejo 13an–26an de Julio. Kurso por komencantoj en la popola altlernejo de la paca, media kaj solidareca movadoj en Svedio. La kurso inkluzivas partoprenon en IJK kiu estos la duan semajnon de la kurso. Kosto 1900 kronoj inkluzive manĝaĵoj, loĝado kaj partopreno de IJK. Aliĝo antaŭ la 15an de junio. Plia informo (svede, angle, hispane) ĉe Färnebo folkhögskola, Box 23, 810 20 Österfärnebo, tel 0291-20275, retposxte info@farnebo.fhsk.se. Informo en Esperanto ĉe Viktor Söderqvist, viktro@bigfoot.com.

## Konferenco de instruistoj

La 36-a Konferenco de ILEI, 2003.08.02-07 okazos en Örestrand apud Höganäs. Detala informo kaj aliĝilo troviĝas en ILEI-gazeto Internacia, Pedagogia Revuo 02/4 kaj 03/1.

Vi povas peti aliĝilon ankaŭ de: Boomee Kim-Lindblom (tel:08-777 4175) aŭ vi povas preni de EC en Stokholmo.

## Ĉefministro honora protektanto

La sveda ĉefministro Göran Persson akceptis esti Honora protektanto de la 88-a Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo.

Franko Luin

## Virtuala UK por nekongresanoj

La ĉijara 88-a Universala Kongreso, okazonta en Gotenburgo, Svedio, funkciigos ankaŭ t.n. virtualan kongresejon, en kiu nekongresanoj povos sekvi la laborojn de la kongreso lege, bilde kaj aŭde. Tio estos la unua klopodo, tial pionira. Krom legi kaj aŭdi pri la diversaj aranĝoj, eblis sendi

mesaĝojn al ĉiuj kongresanoj (ĉiu ricevos propran retadreson, kiu funkcios nur dum la kongresa semajno), pridiskuti la kongresan temon kaj aŭskulti eldirojn de kongresanoj. La virtuala kongresejo funkcios ĉe la adreso [www.uk-2003.net](http://www.uk-2003.net).

Franko Luin

## Sveda akademio apogas finance e-simpozion

La Akademio de Esperanto, kunlaborante kun profesoroj Sture Allén kaj Sven-Göran Malmgren de la Gotenbarga Universitato, arangos simpozion pri interkultura komunikado en Gotenburgo, Svedio, 2003-08-02–03. La simpozion apogas finance la Sveda Akademio, fondita en 1786 de la reĝo Gustavo III. Sveda akademio decidis pri la ĉiujaraj Nobelpremioj pri literaturo. Laborlingvoj: Esperanto kaj la angla. Tempo: 2003-08-02 14:00 ĝis 2003-08-03 17:00. Loko: Gotenbarga Universitato, Instituto de la sveda lingvo, Renströmsgatan 6, Gotenburgo, Svedio.

Irja Kaponen


## Nybörjarkurs under kongressen

I Katrinelundsgymnasiet kommer Lars Forsman att leda en nybörjarkurs i esperanto under kongressveckan. Den är främst tänkt för nybörjare som inte deltar i kongressen eller om det är någon kongressdeltagare som inte kan esperanto (det kan ju vara någon som följer med sin esperantotalande äkta hälft). Troligtvis kommer kursbiljetten att vara gratis, men det finns inte obegränsat med biljetter, för storleken på klassrummet begränsar. Ej heller har man ännu bestämt vilka dagar och klockslag kursen skall gå. Upplysningar om detta kommer att finnas uppsatta vid kongressingången, vi kommer också att försöka meddela detta via Rapida Informilo, mail osv. Biljetterna kommer troligtvis att finnas alldeles innanför kongressingången (meddelas senare).

# Kiel legi – ĉu legi – Stellan Engholm?

*Tiu ĉi literatura eseo pri konata sveda Esperanto-verkisto estis premiita per la unua premio en Belartaj Konkursoj de UEA 2000, en la branĉo "eseo". Ĝi antaŭe estis publikigita en Fonto.*

La centjara datreveno de la naskiĝo de Stellan Engholm en 1999 pasis preskaŭ nerimarkite en la Esperanta mondo. Ŝajne tiu nomo, kiu en 1930 aperis subite kaj brile kiel fulmo en la tiam ankoraŭ malriĉa Esperanta literaturo, el la "mezo de nenie" en la svedaj arbaroj, hodiaŭ vekas nur ŝultrolevon aŭ oscedon.



## Ĉu merite?

Se ni volas tamen kompreni la figuron de Stellan Engholm, ni bezonas iom mergiĝi en lian tempon kaj medion. Kaj eble ni ne atendu, ke li envultu nin per la socia genio de iu Baghy aŭ la sorĉistina ĉarmo de iu Boulton.

La fono de Stellan Engholm estis la kamparo de meza Svedio, pli precize de la regiono nomata "Mina lando" – svede *Bergslagen*. Tiu regiono havas iom ameban amplekson, eniras plurajn provincojn, inkluzivante regio-

nojn kie oni ĉerpis feron kaj aliajn metalerojn el la grundo, fandis kaj prilaboris tiujn metalojn en urbetoj aŭ eĉ vilaĝaj uzinoj kun helpo de la ĉie ĉeestanta forto de fluanta akvo kaj de la ĉion brakumanta arbaro transformebla en lignokarbon. Tiu estis regiono samtempe riĉa kaj malriĉa – riĉa ĉar sur ĝia produktado baziĝis la relative malfrua industriiĝo de Svedio, malriĉa ĉar ĝi estis kaj eĉ hodiaŭ restas dominata de la laborista klaso – dum tradicia burĝaro, meza kaj supera klaso, preskaŭ forestis. Engholm mem ŝajne devenis el miksitaj medio malriĉa, de homoj parte kulturantaj la teron, parte laborantaj en la ferindustrio. Lian ligitecon kun la tero kaj obsedon pri la rilato inter homoj kaj tero ni spertas en lia grava verko "Homoj sur la tero", kies ĉeftemo estas ĝuste tiu eterna rilato.

Post kelkajara manlaborado la juna Engholm frekventis instruistan seminarion en la urbo Strängnäs, kaj fariĝis instruisto de elementaj lernejoj en la "Mina lando". Tie renkontis lin aroj da infanoj el laboristaj hejmoj, preskaŭ ĉiam sen eduka tradicio, ofte sen profundaj radikoj en la loĝloko – ĉar la uzinoj tiutempe suĉis al si laboristojn el ĉie, kaj ankaŭ elspulis kelkajn. Li kelkfoje ŝanĝis loĝlokon sed preskaŭ la tutan plenkreskulan vivon restis en la regiono de la urbeto Ludvika, ĉe la limo inter Dalekarlio kaj Vestmanio. Kiam ni legas liajn verkojn, precipe la trilogion pri "Torento", ni imagu lin tie, en klasĉambro de simpla lerneja domo el ligno, inter aroj da bruaj infanoj, kiuj mem malalte taksis la lernejan saĝon, kaj kies gepatroj plejparte preskaŭ same malmulte aprezis ĝin.

Oni notu ankaŭ la popolajn movadojn de la epoko kaj medio: Unue la diversajn branĉojn de la laborista movado, ĉefe la sindikatojn kaj la socialdemokratian partion. Due la kooperan movadon, kiu celis antaŭ ĉio krei popolan alternativon al la private posedataj butikoj. Trie la movadon de abstinuloj, kiu klopodis malhelpi al homoj droni en maro el alkoholo. Krome diversajn kulturklerigajn movadojn, interalie ankaŭ la esperantomovadon, kaj plue movadojn por flegi, ekzerci kaj iom romantike idealigi la homan korpon. Gravas rimarki, ke la religiaj movadoj havis malfortan bazon en ĉi tiu regiono. La granda ŝtata eklezio Luterana malmulte signifis en la novaj, sentradiciaj uzinurbetoj. Kaj ankaŭ la disidentaj sektoj tie estis malfortaj.

Sed ni revenu al la personaj spertoj de Stellan Engholm. Li naskiĝis la 25-an de marto en 1899. Lia patro frue mortis pro ftizo, kaj kiam la patrino reedziniĝis, ŝi ne retenis Stellan ĉe si, sed li devis ekloĝi ĉe sia 70-jara onklo, kiu estis vidvo. Tie li kreskis, sola infano, ĉe bruska maljunulo kaj maljuna mastrumistino. Kiel 11-jarulo li eklaboris en siaj liberaj horoj en ĝardeno. En 1913, kiel 14-jarulo, li verkis la unuan konatan poemon, kompreneble en sia gepatra lingvo, la sveda. Dum 1916-20 li studis por iĝi instruisto. Proksimume en 1918 li renkontis la svedan poeton Dan Andersson, pri kiu ni baldaŭ okupiĝos iom pli detale. Samjare li eklernis Esperanton sed restis komencanto. En 1922 li edziĝis al Olga, estonino, kaj ekloĝis kun ŝi en Nyberget, proksime de sia origina hejmloko. En 1927 li renkontiĝis kun Edmond Privat en koopera mondkongreso. Tiu renkontiĝo puŝis lin pli intense okupiĝi pri Esperanto, kaj du jarojn poste, en januaro de 1929, li ricevis la definitivan puŝon. Andreo Cseh prelegis, kredeble en Ludvika, kaj Sam Jansson interpretis sveden. Subite Sam Jansson rekonis Stellan Engholm inter la aŭskultantoj kaj vokis lin transpreni la interpretadon. Post tio Engholm, laŭ aserto de sia edzino, "fariĝis vera 'tradukmaŝino'". Oni rakontas, ke li, kiu mem estis trankvila, pripensema, silenta, preskaŭ timema, rolante kiel interpretisto facile sekvis kaj dublis viglajn kaj vervajn paroladojn.

Post ĉi tiu evento Stellan Engholm ekaktivis Esperante interalie pri tradukado kaj originala verkado. Li esperantigis inter 1930 kaj 1935 aron da gravaj verkoj el la sveda literaturo, interalie Gösta Berling de Selma Lagerlöf kaj la dramon Pasko de August Strindberg. Samtempe li kreis aron da originalaj verkoj, kiujn ni ĉi tie traktos.

En 1930 aperis lia novelego "Al Torento", kiu vekis grandan atenton en la Esperanta mondo. Por kompreni ĝian reeĥon necesas pripensi, ke por multaj homoj Esperanto ankoraŭ estis nura "helplingvo", en kiu ne indas provi krei originalajn verkojn. En raporto de Jean Forge en *Literatura Mondo* de 1932, ni trovas la opinionon de Stellan Engholm esprimantan je vizito de Forge en Nyberget: "Laŭ mia opinio ĝi estas vivanta lingvo, en kiu ĉiu povas libere verki. La evoluo de la lingvo laŭ mia opinio estas akcelata ĝuste per la originalaj verkistoj." Kaj plue: "Ĝi ankoraŭ estas uzata tro malmulte en la praktiko kaj tial la vortoj

ankoraŭ ne penetris tro profunde en la sentojn de la esperantistoj”.

En 1931 *Literatura Mondo* aranĝis romankonkurson, en kiu estis premiita kaj eldonita verko de Engholm, *Homoj sur la tero*. Tiun verkon renkontis tre favoraj prijuĝoj, kvankam oni povus diri, ke la komenco kaj mezo de la 30-aj jaroj ne estis la plej konvena momento historia por tiu serioze trankvila kroniko, kies ĉefa interna ideo eble estas *kontinueco en ŝanĝiĝoj*. En ĝi Stellan Engholm fosas profunde en la humon, prezentante multajn aspektojn de la ligo inter homo kaj tero.

La romano prezentas kamparan familion tra tri generacioj. Ili estas dekomence posedantoj de negranda bieno, sed kio efektive gravas, laŭ *Homoj sur la tero*, estas ne tiom la posedo kiam la laboro kaj respondeco pri la kulturata tero. Engholm montras tiun laboron laŭ diversaj aspektoj, pozitivaj kaj negativaj. La esenco finfine estas, ke la respondeco pri la tero, la kulturado de la tero, estas bazo de la homa ekzistado kaj de la homa memestimo. Krome ĝi signifas, laŭ la romano, ligan inter homoj – inter la samtempuloj, sed eble eĉ pli grave inter malsamaj generacioj.

En *Homoj sur la tero* troviĝas ankaŭ alia ĉeftemo – izoligemo, distanco inter la homoj, sento de fremdiĝo de homo al homo. Kaj tiu temo eble estas la ĉefa komunaĵo en la diversaj verkoj de Engholm – fremdeco kaj sopiro je kuneco inter la homoj. Jen ekzemplo el *Homoj sur la tero*:

”En la libroj li legis pri homoj, kiuj tiom bone komprenis unu la alian kaj tial vivis tre feliĉe. Kiam li legis tion, li sentis preman sopiron mem travivi ion tian. Kial Selma kaj Kristoforo ne komprenas lin, same kiel la homoj en la libroj komprenas unu la alian? Kaj certe Selma kaj Kristoforo eĉ ne komprenas sin reciproke.”

Stellan Engholm tamen revenis al sia inventita ”Toronto”, kiu estas tipa uzina urbeto aŭ vilaĝego de lia regiono. Kaj nun li okazigis tie tutan ĉenon da eventoj, lokis tien aron da protagonistoj, la infanoj kaj gejunuloj de Toronto. En 1934 aperis la unua parto de *Infanoj en Toronto*, en 1939 la dua parto (iam reeldonita sub la titolo *Junuloj en Toronto*). Aŭskultante per radio la militraportojn el ĉiu direkto ĉirkaŭ la izolita Svedio, li verkis plu, kaj en 1946 aperis la tria parto kun la titolo *Vivo vokas*. (Tiu titolon, cetere, al la verko tradis la eldonejo, Eldona Societo Esperanto.)

Kiam oni hodiaŭ legas la Toronto-trilogion, unuavide iom ŝokas aŭ almenaŭ ĝenas la idealaj karakteroj de la infanoj. La medio, la eventoj, la tempo mem estas tre realisme scenigitaj, kaj kontraŭ tiu fono reliefigas homoj

iom tro idealaj, tro seriozaj, infanoj tro frumatraj. En aliaj romanoj oni kutimas renkonti protagonistojn realisme kaj plenuance prezentitajn kaj flankfigurojn pli kliŝajn. En Toronto povas fojfoje ŝajni inverse.

Tamen Stellan Engholm mem ne konsideris sian verkon realisma romano, sed io alia. Ni citu el lia enkonduko al *Vivo vokas*: ”En certa grado ili [la infanoj] fariĝas reprezentantoj por pli belaj kaj bonaj homaj sopiroj, kies realigo estas la senco de ilia vivo. (...) La libroj pri ili ne havas dramecan karakteron, ne havas romanagan agokonstruon. La ’intrigo’ estas sole la vivo mem.”

Pli precize Engholm klarigis sian ideon en letero al Leen C. Deij la 5-an de februaro 1947 (laŭ *Literatura Foiro* n-ro 178): ”Miaj infanoj estas ja kelkrilate kuriozaj figuroj, nerenkonteblaj inter ordinaraĵoj. Kaj tial la demando estas, ĉu la homoj povas kompreni, kion mi volas esprimi, ĉu ili entute havas sentokapablon por tio, kion mi provas prezenti. Ke leganto perceptas la realecon en tiuj rakontoj (la internan, universale homan realecon) estas por mi multe pli da ĝojo ol plej belaj recenzoj.”

Estas klare, ke la recenzantoj ne akceptis la Toronto-trilogion tiel, kiel Engholm dezirus. Ili serĉis en ĝi ian socian realismon, kiu ankaŭ troviĝas tie, tamen nur kiel fono. La centro de la verko, enkarmita en la infanoj, ne estas realisma priskribo sed *la sopiro je homeco* de la aŭtoro. Denove ni legu en letero al Leen C. Deij, ĉi-foje de la 14a de marto 1947 (laŭ *Literatura Foiro* n-ro 179), kie li komentas la akcepton de *Vivo vokas*:

”Ĝis nun mi ne vidis recenzon pri ’Infanoj III’ (mi ne volis havi apartan titolon) kiu montris ion de tio, kion mi provis enmeti en la libron. Tio ne gravas, sed estas strange, ke ili ŝajne tute ne vidas la esencan aferon, eĉ se ĝi estas nebone prezentita. La mankojn de la libro mi tre bone konas. Ĝi ja ne estas romano aŭ ’rakonto’. Estas nur mia sopiro pri la homoj kaj la homa vivado, kiu troviĝas tie. Tiaj infanoj ja ne ekzistas, almenaŭ ne pli ol parte, sed ŝajne la homoj kredas, ke temas pri iuj certaj infanoj en la sveda ferindustria regiono. Por mi ili estas pli vivaj ol iuj infanoj – kaj iuj homoj – kiujn mi iam renkontis, sed cetere ili estas ja ĝermanta embrio de iom pli alta homspeco (laŭ mia subjektiva koncepto).”

Ja leganto rajtas kritiki kaj malŝati tiun ideon de la aŭtoro, enmeti sian ”sopiron pri la homoj kaj la homa vivado” kiel ĉefrolanton de verko cetere realisma. Eblas aserti, ke tian verkon neniu povas verki. Oni rajtas esprimi grandan dubon kaj skeptikecon al ”ĝermanta embrio de iom pli alta homspeco”. Oni estas libera preferi la malaltajn homojn de nia reala mondo. Sed ĉiu homo, kiu volas legi la To-

rento-trilogion, ŝuldas almenaŭ klopodi kompreni, ke tia estis la intenco de la aŭtoro. En pliaj leteroj al Deij li rakontas, ke unuopaj legantoj skribis al li, ke ili proksimume tiel komprenis lian verkon. Estus bone por la Esperanta literaturo, se ankaŭ recenzantoj iom klopodus por trakti la recenzotan verkon laŭ tio, kio ĝi estas, anstataŭ bedaŭri, ke la verkisto ne verkis tute alian verkon!

En la verkoj de Stellan Engholm oni sendube povus trovi multajn erojn pli-malpli rekte ĉerpitajn el lia propra vivo. Ni pensu ekzemple pri Arne en *Torento*, kiu same kiel la juna Stellan perlaboras en ĝardeno. Aŭ pri Selma en *Homoj sur la tero*, kiu ”ŝatis la infanojn, tamen sen pli profundaj sentoj. Je la naskiĝo de la knabino la patrino amo ja ekflamis. Tamen ĝi ne ampleksis ambaŭ infanojn. La knabino estis ĉio. Ke la knabo ankaŭ estas ŝia infano, ŝi ŝajne preskaŭ forgesis.” Tia aŭtobiografia legado de la verkoj tamen ŝajnas esence ne konvena al ilia spirito. La verkoj de Engholm baziĝas tiel multe sur liaj ideoj kaj vivkoncepto, ke la deveno de konkretaj detaloj malmulte gravas.

La svedlingva prozo de tri jardekoj, ekde 1930 ĝis 1960, grandparte konsistas el tiel nomata proleta skolo. Striktsence ne temas pri literatura skolo, sed simple pri tiu nekutima okazo, ke junaj viroj kaj virinoj el malriĉaj laboristaj hejmoj, sen formala alta eduko, suriras kaj konkeras la literaturan parnason. Por plene kompreni kiel tio eblis, necesus mergiĝi ĝiskole en la svedan historion: la manko de grava feŭda periodo, la aliancoj inter reĝoj kaj popolo kontraŭ la nobelaro, la naturaj agrikulturaj kondiĉoj kiuj malebligis bienegojn, la desupre truditan luteranisman, la ĝeneralan legokapablon instigitan de pastroj, la popolan elementan lernejon... nu, eble sufiĉas. Ni rimarku tamen, ke Stellan Engholm evoluis ne tiel multe ene de tiu proleta verkistaro, kiel apud ĝi. Troviĝas tamen unu persono, kiu sendube grave influis lin, kvankam la simileco ne okulfrapas, kaj tiu estas Dan Andersson.

Dan Andersson estis filo de instruisto de elementa lernejo. Li naskiĝis en 1888 kaj kreskis en arbarea vilaĝeto Skattlövsbyn en la tiel nomata Finna arbaro de Grangårde, apud la hejma regiono de Engholm. Li havis diversajn manlaborojn (interalie en ĝardeno, kiel Stellan), sed baldaŭ iĝis konata poeto en tute propra ĝenro. Liaj poemoj kaj kanzonoj temas pri la plej malriĉa, forgesita, malestimata popolo de la kaŝitaj arbaraj dometoj kaj kabanoj. Tamen tute ne temas pri ia soci-indigna realismo. Li trovis, elserĉis kaj rekreis inter la plej malriĉaj

homoj ian magion, foje kvazaŭreli-  
gion. Ne eblas diri, ke lia mistikismo  
efektive fontas en la popola kulturo,  
sed ĝi eluzas tiun per verkado esence  
romantika. Malgraŭ tio lia verkaro  
vere trovis reehon ĉe la popolo, ĝi ek-  
ĝermis tie kaj efektive — eĉ ĝis hodiaŭ  
— iĝis parto de la popola kulturo.

Stellan Engholm renkontis Dan  
Andersson dum sia studado en  
Strängnäs por iĝi instruisto. Ili plurfo-  
je renkontiĝis, kaj oni scias ke Dan  
Andersson multe signifis por Stellan  
Engholm. La rilaton interrompis la  
tragike akcidenta morto de Dan An-  
dersson en 1920.

Supraĵe oni devas trovi la verkojn  
de Engholm tre foraj de tiuj de Dan  
Andersson. Tamen eblas senti sub la  
kvietaj, ŝajne senemocia surfaco ĉe  
Engholm iun kaŝitan ardon, intensan  
sopiradon, kiu sendube parencas kun  
ĉiam ĉeestanta tono en la poemoj kaj  
kanzonoj de Dan Andersson. Temas  
pri nenio malpli granda ol la sopiro je  
homeco kaj vero. Ankaŭ la interesiĝo  
de Dan Andersson al foraj religioj,  
precipe al la hindaj, transdoniĝis al  
Engholm, same kiel eble la interesiĝo  
al fremdaj lingvoj.

La politika perspektivo de Engholm  
estas nur proksimume deduktebla el  
liaj verkoj. Precipe en la Torento-trilo-  
gio oni trovas multajn interesajn deta-  
lojn el la tiam aktuala politiko. Unu  
frato iĝas simpatianto de nazioj, dum  
alia ekbatalas en la Internacia Brigado  
kontraŭ la Hispanaj faŝistoj. La  
simpatioj de la verkisto estas klare  
kontraŭfaŝismaj. En la *Torento-trilo-  
gio* la laborista movado estas mem-  
komprenebla kadro de la socia enga-  
ĝiĝo. Eĉ pli evidenta ol lia maldekstre-  
mo tamen estas la baza humanismo  
de la aŭtoro.

Interese estas konstati, kian kon-  
kludon li faras pri sia propra Esper-  
peranta agado rilate al la nocio

“neŭtra-leco”. De 1943 ĝis 1952  
Engholm eldonis kulturan revuon,  
*Malgranda Revuo*. Kvankam aperanta  
en malfacilegaj cirkonstancoj, tiu  
signifis multon, interalie por la tiam  
juna kaj nekonata Skota kvaropo. En  
sia revuo (n-ro 3 de 1949) meze de la  
malvarma milito li skribis pri neŭtra-  
leco: “mi ne deziras, ke MR estu neŭ-  
trala (...) Movado kun limigita kaj  
klare fiksita celado povas esti neŭ-  
trala, ekzemple la esperanto-mova-  
do kiel nura lingva afero, la kooperati-  
va movado ktp. Sed esti neŭtrala al  
la tuta, nelimigita vivcelado, tio signi-  
fifus, ke oni restas pasiva antaŭ bono  
kaj malbono, justo kaj maljusto, ke  
etikaj valoroj estus al ni indiferentaj  
aŭ kvazaŭ ne ekzistus (...)”

Tiun revuon Stellan Engholm ek-  
eltonis en 1943, dum la turnopunktoj  
de la dua mondmilito, en Ludvika —  
en la “neŭtrala” Svedio — sciante ke la  
laboristoj en la uzinoj de Ludvika kaj  
aliaj partoj de la sveda Mina lando  
produktas ŝtalon kaj ferajn produk-  
tojn necesajn al la Germana militado.  
Ke li pensis pri tiu dilemo, tion ni sci-  
as, ĉar li emetis ĝin en sian Torento-  
trilogion. Jam du jarojn antaŭ la dua  
mondmilito li verkis (*Infanoj en To-  
rento 2*):

“(…) oni bezonas pli da militŝipoj,  
pli da kanonoj, pli da pafiloj, pli da  
tankoj kaj flugmaŝinoj. (...)”

— Do nia pano donos morton al ka-  
maradoj en aliaj landoj!

— Eble, eble eĉ al ni mem, ni ne kon-  
nas la estonton. Sed kion fari? Panon  
ni ja devas havi.”

Unu el la pli frue menciitaj sociaj mo-  
vadoj tipaj de la epoko kaj medio de  
Engholm estis movado por kulturi la  
homan korpon. Tiun idealigon de for-  
ta, pura, ofte nuda korpo ni trovas en  
la 30-aj jaroj, fojfoje en ligo kun diver-  
saj politikaj tendencoj. Ĉe Engholm  
oni trovas ĝin interalie en formo de  
kultado de nudeco, iom surprize atri-  
buita al la *Torenta* grupo el infanoj kaj  
dekumuloj.

Kunlige kun tiu temo necesas iom  
trakti ankaŭ la temon erotiko ĉe En-  
gholm. En letero al Leen C. Deij la 26-  
an de majo 1948 li skribis (laŭ *Litera-  
tura Foiro* n-ro 182): “Kun rilato al  
blasfemoj mi ekpensas pri seksaj vor-  
toj. En esperanto tiuj vortoj estas pu-  
raj, ne tuŝitaj de homa aĉeco. Kiu ajn  
povas uzi ilin en parolo kun kiu ajn.  
Tio estas unika afero en ‘kulturnivelaj  
lingvoj’. Kaj jen venis tiuj budapeŝta-  
noj kaj volis pliriĉigi la lingvon per  
vortoj adekvataj al tiuj nacilingvaj,  
kiuj esprimas sole homan stultecon,  
senspiritecon.”

Oni vidas antaŭ si la instruiston  
meze de sia bando da buboj, kiuj ĵetas  
inter si kaj post la knabinoj fivortojn  
nur duone komprenitajn...

Tamen ne eblas limigi sin nur al la  
vortoj. Eĉ la erotiko mem estas apar-

ta ĉapitro ĉe Engholm. Lia debuta  
verko, *Al Torento* (kiu ne havas rolan-  
tojn komunajn kun la Torento-trilo-  
gio), temas pri amrilato inter juna  
viro kaj juna virino. La knabino  
gravediĝis per alia viro, kio obstaklas  
la amon inter la du ĉefrolantoj. Kvan-  
kam do erotiko estas la kerno de la  
intrigo, ĝi neniam estas eksplicite  
menciata. Nu, tio ja ankaŭ ne neces-  
sas, tamen kiam seksaj aferoj estas  
subkomprenataj, tio ĉiam okazas kun  
forte malŝata nuanco.

Same estas en la Torento-trilogio.  
Inter la gejunuloj forestas erotiko, eĉ  
la plej simpla seksa tiklo, sed ĉirkaŭ ili  
ĝi zumadas, tamen ĉiam en malbela,  
ofte eĉ naŭza formo. Kaj tamen tute  
ne temas pri ia bigota kondamno al  
pekoj kaj fiaĵoj.

Anstataŭe oni imagas proksimu-  
me la jenan sintenon: Erotiko kaj sek-  
saj rilatoj principe estas io bela, pura,  
natura — sed ĝiaj konkretaj aperaĵoj  
bedaŭrinde ĉiam estas malbelaj, mal-  
puraj, pro la malperfekteco de la ho-  
moj.

Nu, konsentite, Stellan Engholm  
nenie vortumas la aferon tiel. La le-  
ganto devas mem konkludi — ĉu kiel  
supre, ĉu alimaniere.

Se iu hodiaŭ volas konatiĝi kun Stel-  
lan Engholm, kie do komenci?

Lia plej bona, plej matura verko,  
kiun oni eĉ hodiaŭ devas konsideri  
unu el la malmultaj plensence origi-  
nalaj Esperantaj romanoj, estas Ho-  
moj sur la tero (dua eldono de Stafeto,  
1963). La verkoj pri Torento eble  
unuavide pli facilas, se oni rigardas la  
lingvajon kaj rakontan teknikon. Ta-  
men sendube troviĝas akuta risko, ke  
hodiaŭa leganto, kutima je agoplenaj  
dramoj, kie bono kaj malbono luktas  
en realisma kadro, trovos ilin tro psi-  
kologie malrealismaj.

Rekomendebla komenco do povus  
esti kelkaj noveloj, kiuj bonŝance re-  
aperis ĉe IEM en 1997 sub la titolo *La  
lupo sur Kapitolo*. Precipe la du longaj  
noveloj *Maljunulo migras kaj Venĝo*,  
origine aperintaj en 1943, estas du  
etaj perloj, kiuj tre bone povas enkon-  
duki la leganton en la stilon kaj tema-  
ron de Engholm. Se oni ne postulas  
ridegon, eblas trovi en tiuj eĉ nuan-  
con de leĝera humuro, kio alie estas  
rarajaĵo ĉe Stellan Engholm.

Se oni entute rajtas ion ajn riproĉi  
al viro mortinta en 1960 post pli ol  
plene farita laboro, tio eble estas ĝus-  
te lia manko de humuro. Seriozeco  
plej karakterizas lin, seriozeco kaj tre  
forta strebo al vero, sincero kaj puro.  
Tiuj trajtoj, nekontesteble bonaj al  
homo ĝenerale, al verkisto tamen sig-  
nifas limigon. Stellan Engholm ape-  
naŭ povis diri, ke nenio homa al li  
fremdas. Tial lia ĉiama sopiro al ho-  
mecco povas fojfoje simili fuĝon for de  
homaĵoj.

Sten Johansson

## Stellan Engholm en eLibrejo

([www.esperanto.nu/eLibrejo](http://www.esperanto.nu/eLibrejo))

Homoj sur la tero	177 p.
Al Torento	84 p.
Infanoj en Torento	287 p.
Vivo vokas	179 p.
<i>kaj kelkaj tradukoj:</i>	
Selma Lagerlöf: Gösta Berling	496 p.
Selma Lagerlöf: La mono de sinjoro Arne	86 p.
Selma Lagerlöf: La ringo de la generalo	106 p.

# Esperanto-Domo hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ dependas de libervola laboro



*"Esperanto-Domo" estas la nova Esperanta nomo de Esperanto-Gården, kiu ĝis nun havis nur svedlingvan nomon. Ĉu vi scias kiel funkcias Esperanto-Domo?*

Dum miaj unuaj Esperanto-jaroj en la komenciĝo de la 1980-aj jaroj kelkaj esperantistoj diris: "Imagu, ke ni havas propran kursejon aŭ popolan alternejojn." Kiam Karlskoga popola alternejo organizis sian Esperantan programon, tiu diskutado preskaŭ ĉesis. En 1995 mi tamen vidis ke dommakleristo en Filipstad volas vendi eksan maljunulejon "Fridhem". Mi invitis tridekon da esperantistoj en diversaj organizaĵoj al Lesjöfors en Majo 1996. Venis 17 kaj ĉio komenciĝis...

Kiam ni en 1997 promenis tra Esperanto-Domo iu esperantisto diris: "Tio ĉi vere estas grandega domo. Kiel ni povas havi monon posedi tian? Estus pli bone havi malpli grandan domon por kolekti esperantistojn." Mia respondo estis: "La ideo estas ke multaj neesperantistoj venu al ED por tranokti, tiel ke ni gajnos monon. Samtempe ni eble povos interesigi ilin pri Esperanto kaj havos novajn esperantistojn."

La realo estas, ke la nombro da tranoktantaj neesperantistoj kreskas kaj la nombro de tranoktantaj esperan-

tistoj male malkreskas. En 2003 ni dank'al IJK kaj al postkongresa vojaĝo al Vermlando kaj Dalslando havos pli da esperantistaj gastoj.

Dekomence la ideo estis, ke ni povu plukonstrui en la domo per libervolaj laboroj. La ekonomio por aĉeti materialon limigas la tuton. Montrigis, ke multaj esperantistoj donacis aŭ pruntedonis monon, kaj aĉetis investkompaniajn atestojn en ED. Tial ni sukcesis evolui la domon pli rapide ol mi povis supozi. Grandan dankon!

Male montrigis, ke esperantistoj ne tiel multe povis aŭ volis sensalajre helpi en ED. Maljunuloj opinias, ke ili ne havas fortojn, kaj mezaĝuloj kaj junuloj opinias ke ili ne havas tempon. Do, memoru ke oni povas veni iam ajn por helpi. Klubo povas organizi kluban vojaĝon al ED por helpi en la domo.

Mi ne volas menci iujn nomojn de helpantoj, sed pri unu helpanto mi ne povas silenti. Tio estas Karl Elofsson el Leksand, kiu ofte estas tie ĉe por plibonigi la domon. Grandan dankon al li kaj al aliaj kunlaborantoj, kiujn mi ne mencias tie ĉi.

Kiam estas grandaj aranĝoj ni bezonas multajn kromajn helpantojn. Ekzemplo estas la sveda ralio, kiu okazas la unuan semajnfino en Februaro.

Komence estis lunĉa restoracio. Tiu tamen nun ne plu funkcias dum la semestroj, sed nur somere. Oni ta-

men povas mendi lunĉojn, se oni avertas antaŭe.

Kio pri la estonteco? Karl konstruis saŭnon. La rezulto estas ke estonte sportaj kluboj, precipe skiaj, pli volonte organizos trejnadajn tagojn ĉe ni. Okazos pli da neesperantistaj tranoktoj.

Ni tamen devas ŝi okazigi ankaŭ Esperantajn aranĝojn ĉe ni. Estas grave ke tiuj, kiuj instruas en Esperanto-kursoj rakontos ke en ED okazos en ĉiu Junio tutsemajnaj kursoj en diversaj niveloj. Ni esperas ke okazos ankaŭ tutsemestraj kursoj. Mi ne ŝatas, ke oni organizas tutsemajnajn Esperanto-kursojn *samtempe* en malsamaj lokoj en Svedio. La rezulto povos esti, ke kursoj tute ne okazos.

Dum la unua jaro multaj gastoj diris: "Esperanto? Ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas? Ĉu ni vere bezonas ĝin kiam ekzistas la angla?" Nuntempe mi malofte aŭdas tiajn dirojn, sed la plejmulto havas tute seriozajn demandojn pri Esperanto. Ili volas scii kiel ekestis la lingvo, kiuj parolas ĝin k.t.p. Ŝajnas ke la pendolo moviĝas al la pozitiva flanko rilate al la opinioj pri Esperanto.

Kia estos Esperanto-Domo en la estonteco? Tio estas demando por ni ĉiuj.

**Lennart Svensson**  
Mallongigis kaj esperantigis LN

# Postkursa Karlskoga

*En la sveda urbo Karlskoga la popola altlernejo dum dekelk jaroj havis apartan Esperanto-programon. Post la pensiigo de la ĉefa instruisto Lars Forsman, la programo ne plu okazas.*

Karlskoga Popola Altlernejo jam de longe planis redukti la nombron da kursoj kaj kiam mi pensiigis, estis tute nature ĉesi la esperanto-kursojn. Dum 36 jaroj mi estis lingva instruisto en la lernejo pri la sveda, angla kaj germana lingvoj, sed la lastajn 15 jarojn 1988-2002 mi ĉefe instruis Esperanton. Studentoj el 40 landoj lernis la lingvon kaj la plimulto trapasis la internacian ekzamenon de la lernejo. Ses lernolibroj kaj kelkaj kasedoj estas faritaj dum la jaroj kaj ili ankoraŭ estas por vendo. Kompreneble estis multe da laboro realigi la kursojn — mi devis unue lerni la lingvon, kontaktiĝi kun esperantistoj kaj kluboj, organizi kaj plani la instruadon kaj finfine trovi lernantojn. La lasta ne estis facila afero, ĉar multaj “aliĝis, promesis veni, certe studos”, sed je la kursstarto ne montris sin.

Tamen la alvenintoj kaj la laboro donis al mi grandan plezuron kaj tiel mi ricevis energion sufiĉan por ĉiun semajnon labori kromajn horojn sen-

page, inviti al ekskursoj aŭ vesperaj lecionoj aŭ prilabori individuajn lecionojn. Tial mi nun tre ĝojas esti libera por iom ripozi kaj denove ŝarĝi la bateriojn.

Sed mi nun ne tute senlaboras. En Karlstad mi havas vesperan kurson. La ok partoprenantoj ricevis informon pere de ekskarlskoganoj de la dana kosmologia movado. En Örebro mi instruas ses studentinojn en la Karro-gimnazio, kiuj jam siavice vizitis aliajn lernejojn por informi.

Foje mi estas invitita al kluboj por prelegi pri la jaroj en Karlskoga, ekz. en Gotenburgo, Västerås kaj Lesjöfors.

Antaŭ du jaroj mi informis pri Esperanto en Esperanto-Gården al historio-instruistoj. La gvidanto de la seminario instruas ĉe la universitato de Karlstad kaj la informo tiel plaĉis al li, ke ĝi ĉi-jare venis kun siaj 85 instruisto-kandidatoj por informiĝi pri la lingvo. Ili jam sciis iom pri ĝi ĉar ĉiuj jam legis la libron Muziko de Vittula de Mikael Niemi. Estas interese, ĉar jam venontjare tiuj 85 vizitintoj estos instalitaj en klasoj kaj lernejoj diversloke en Svedio kaj povos doni ĝustajn klaj entuziasmajn respondojn pri nia lingvo al kolegoj kaj junaj lernantoj.

Fine mi esperas ke la lernolibro por

gimnazianoj (Forsman, Lörnemark, Randehed, Wedlin) estos preta ĝustatempe antaŭ la kongreso en Gotenburgo.

Finfine mi volas informi al viaj amikoj, kiuj ankoraŭ ne ekstudis Esperanton, ke mi dum ĉiu kongresa tago en Gotenburgo instruos al komencantoj. Ili ne bezonas partopreni en la kongreso kaj la lecionoj estos senkostaj.

**Lars Forsman**


Ni elkore dankas al Lars Forsman por lia multjara Instruado en Karlskoga Popola Altlernejo. Lia agado estas preskaŭ unika, almenaŭ en Svedio en nia tempo.

Samtempe ni kompreneble malĝojas, ke la popolaltlernejo ne plu organizos Esperanto-kurson. Ni tamen ĝoju pri la jaroj, kiam okazis la kursoj, kaj pri ĉiuj, kiuj studis tie.

Ni ankaŭ povas ĝoji ke Stokholma universitato aranĝos Esperanto-kurson, pri kio ni antaŭe raportis, kaj ke Esperanto-Domo en Lesjöfors klopodos organizi tutsemestran studadon.

La movado pluvivos en novaj formoj.

LN



Lernantoj en Karro-gimnazio en Örebro. De maldekstre: Karolina, Monica, Linnea, Malin kaj Tove.



# Novaj landnomoj

*Kelkaj landnomoj ŝanĝiĝis pro diversaj kialoj. Tion konstatas Bertilo Wennergren en la ĉi-malsupra artikolo, kiu troviĝas en lia retpaĝaro ĉe [www.bertilo.com](http://www.bertilo.com). Tie vi povas legi plu pri gramatikaj aferoj k.t.p.*

## ANNONS

Invandrare — Översättare. Behärskar du svenska mycket bra och är du dessutom van och duktig på att översätta från svenska till ditt eget modersmål? Då kan Du hjälpa mig att, mot betalning, översätta en 60 sidor (12 pt) lång artikel om Esperanto. Jag vill ha den översatt till alla nu officiella och i framtiden troligen aktuella EU-språk samt även till ryska, högarabiska, amerikanska, bengali, modern standardhindi, kinesiska och turkiska. Svar till Hans Malv, Slättervägen 9, 239 31 Skanör. Tfn 040-47 00 55.

En Februaro 2003 mi tralaboris la ĉi-tieajn listojn de landoj kaj lingvoj, kaj faris, krom iom da ĝisdatigoj kaj korektoj, ankaŭ vicon de gravaj ŝanĝoj. Samtempe mi forigis el PMEG la tieajn listojn de landonomoj (por ne havi superfluan duoblaĵon de la samaj informoj).

La ŝanĝoj konsistas precipe el alkonformigoj al la hodiaŭa praktika uzo en Esperanto. Tio signifas interalie, ke la listoj nun plurdetale deflankiĝas de la Listo de Normaj Landnomoj de la Akademio de Esperanto. La ĉi-tieaj landnomoj tamen ankoraŭ estas plene konformaj al Ĝeneralaj

## La Espero korektas

En *La Espero* 2003:2 mi skribis en recenzo pri *Cetercetero*: "Estas la dua esperanta poemaro de Jarlo, post 'AJN' (1983)." Tio ne pravas, ĉar en 1991 venis "Ike ize ive". Atentigis pri tio Gunnar Gällmo kaj Jarlo Martelmondo mem, kiu sendis ankaŭ la poemaron menciitan.

Skribas Jan Setréus pri sia artikolo pri svahilo kaj Esperanto en LE 2002:6:

"Mi ne kutimas legi miajn proprajn artikolojn post publikigo, sed mi tamen iom rigardetis mian artikolon pri svahilo nun. Mi trovis bedaŭrindan eraron en la listo pri prononco de literoj kaj literkombinoj. Mi ne scias kiam ĝi ekestis, sed kontrolinte mian originon mi ne trovas la eraron tie. Temas pri la literkombino gh, kiun oni prononcas kiel voĉa h, ne kiel voĉa ĝ. Plej proksima al voĉa ĝ estas la litero j post la konsonantoj m aŭ n. Iom ankaŭ diferencas rilate la prononcon de ng (kompare kun ng'), sed en nia Internacia lingvo la prononco de ng ja estas diskutibla afero."

En Oskarshamn popola altlernejo 23 — 27 de Junio 2003 estos ne nur komencantkurso, sed ankaŭ kursoj daŭriga kaj konversacia.

La redaktoro bedaŭras ĉiujn ĉi erarojn en la revuo kaj dankas al tiuj, kiuj informis pri ili.

Rekomendoj pri Landnomoj de la Akademio, kaj ili ankoraŭ plejparte koincidas kun la nomoj en la Listo de Normaj Landnomoj.

*Listo de la plej gravaj ŝanĝoj*

Afganistano > Afganujo  
Kazaĥstano > Kazaĥujo  
Kirgizistano > Kirgizujo  
Taĝikistano > Taĝikujo  
Turkmenistano > Turkmenujo  
Uzbekistano > Uzbekujo  
Egipto > Egiptujo  
Nord-Koreo > Nord-Koreujo  
Sud-Koreo > Sud-Koreujo  
Ukraino > Ukrainujo  
Vjet-Namo > Vjetnamujo  
Aŭstrio > Aŭstrujo  
Kongolo Brazavila > Kongo Brazavila  
Kongolo Kinŝasa > Kongo Kinŝasa  
Togolo > Togo  
Gvineo-Bisaŭo > Gvineo Bisaŭa  
Hindujo > Barato  
Lanko > Sri-Lanko  
Jugoslavujo > Serbujo kaj Montenegro  
Badeno-Vurtembergo > Baden-Vurtembergo  
Turingio > Turingujo  
Tatarstano > Tatarujo  
Konetikuto > Konektikuto  
Miŝigano > Miĉigano

Platdiĉa (lingvo) > Platgermana (lingvo)

Romna (lingvo) > Cigana (Romaa) (lingvo)

En pluraj okazoj la antaŭaj nomformoj estas plu menciataj interkrampe.

Rimarku, ke mi plu uzas UJ-sufiksojn, ne I-sufiksojn, en landonomoj faritaj el nomo de popolo, ĉar laŭ mi tio estas pli klara (la formo de la nomo per si mem tuj montras, ke ekzistas sensufiksa popolnomo). Tiuj, kiuj preferas I-sufikson, povas mem ŝanĝi UJ al I senprobleme.

Bertilo Wennergren

## TEMO

# Kelkaj faktoj pri svedaj tribunaloj

En Svedio ni havas du paralelajn tribunalojn organizojn, kiuj baziĝas sur tri juĝaj instancoj.

1. Ekzistas 72 lokaj (aŭ distriktaj) tribunaloj (*tingsrätter*).

2. La dua instanco konsistas el 6 apelaciaj tribunaloj aŭ kortumoj (*hovrätter*).

3. La plej alta instanco estas la alta kortumo (*högsta domstolen*).

La ĉi-menciitaj tribunaloj ĉefe pri-traktas kriminalajn kaj civilajn procesojn (*brottmål och tvistemål*).

Sur la administracia kampo ekzistas ankaŭ triinstanca organizo:

1. 23 guberniaj tribunaloj (*länsrätter*);

2. 4 fiskaj (kameralaj) tribunaloj (*kammarrätter*);

3. la supera administracia tribunalo (*regeringsrätten*).

Tiuj tribunaloj ĉefe pri-traktas procesojn inter individuo kaj ŝtato/komunumo.

Krome ekzistas kelkaj specialaj tribunaloj: la laborkonflikta tribunalo (*arbetsdomstolen*), la merkata tribunalo (*marknadsdomstolen*) kaj 12 kontrolkomisionoj pri luprezoj kaj farmopagoj (*hyres- och arrendenämnder*).

Se vi volas scii kiel sveda tribunalo funkcias, vi povas viziti juĝejon kaj ĉeesti proceson kondiĉe ke ĝi estas publika. Tre malofte proceso okazas malpublike, malantaŭ ŝlositaj pordoj (*inom lyckta dörrar*).

Mats Landfors

DEZIRAS  
KORESPONDI

Mi nomiĝas Eric kaj mi estas 18jara. Mi vivas en Belgio. Mi lernas Esperanton ekde du monatoj kaj mi deziras korespondi kun homoj. Mia retadreso estas ericdecamps@hotmail.com kaj mia adreso estas Eric Decamps Rue Albert-Elisabeth, 300 7134 Péronnes-Binche BELGIO

Esperanto  
sur-sceneje  
en Oulu

La Urba Teatro de Oulu en Norda Finnlando surscenigis la furoran romanon 'Populara muziko el Vittula' de la sveda aŭtoro Mikael Niemi pri la vivo de du junuloj en nordsveda kampara vilaĝo en la 60-aj kaj 70-aj jaroj. La romano vendiĝis en Svedio en 750 mil ekz. kaj ĝi estas tradukita al multaj lingvoj. Ankaŭ Esperanto estas parolata en ĝi: vizitanta afrika pastro predikas Esperante kun unu el la ĉefroluloj kiel interpretisto. S-ro Allan Mehtonen, delegito de UEA en Oulu, 'reĝisoris' la aktorojn pri la Esperanta elparolo. La premiero okazis la 21-an de februaro.

Fabelkonkurso  
invitas infanojn

La finna Päätaalo-Instituto, [www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti](http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti), organizas fabelkonkurson en Esperanto por infanoj ĝis 13-jaraj (unuopuloj aŭ grupoj). La longeco de la verkoj ne estas fiksita. La konkursaj alvenu ĝis la 15-a de septembro 2003 ĉe: Päätaalo-Instituto, Fabelkonkurso, PL 39, FI-93401 Taivalkoski, Finnlando. Oni uzu pseŭdonimon kaj menciu, ĉu temas pri unuopulo aŭ grupo. La vera nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso estu en alia koverto. Informas

Aini Vääräniemi,  
Vääräjärventie 26 A,  
FI-93590 Vanhala, Finnlando;  
[aini.vaaraniemi@pp.inet.fi](mailto:aini.vaaraniemi@pp.inet.fi).

Osmo Buller

Monato-premioj  
en valoro de  
350 eŭroj

Ĝus aperis la maja numero de Monato, en kiu aperas la granda enigmo 'OTANOM 2003'. Ĉiu, kiu tre atente legas Monaton, havas la eblon gajni valoran monpremion. Tiuj, kiuj deziras paropreni en la konkurso, sed ĝis nun ne abonis, povas skribi al Flandra Esperanto-Ligo, la eldonanto de Monato, per la adreso <http://www.esperanto.be/fel/skribitt.html>

Eŭropotago!  
Esperantistoj  
kunfestu!

'Ni estos en Romo en Piazza del Popolo en la stando de la eŭropaj federistoj por disdoni materialon pri Esperanto,' diras Renato Corsetti kaj Michela Lipari, estraranoj de UEA. Jen ekzemplo kiel esperantisto uzi la Eŭropotagon: Pere de nacilingve tradukita deklaro eblas kontakti naciajn reprezentantojn de la Eŭropa Unio aŭ Konsilio de Eŭropo kaj la gazetaron, samtempe uzante tiun eblon por informi pri Esperanto. La deklaro estis sub kunordigado de la Brusela Komunikadcentro ĝis nun tradukita al entute 22 lingvoj (<http://lingvo.org/xx/3/275/>)!

Nova kultura  
gazeto

Jam aperis la dua numero de la irana du-lingva kultura sezon-revuo *Sabzandiŝan*. La nomo signifas *Mesaĝo de Verdpensuloj*. Ĉefredaktoro estas la direktoro de Irana Esperanto-Centro s-ro Reza Torabi kaj la respondeca direktorino estas lia edzino Fariba N. Maĝd. Ili dum multaj jaroj strebis por ricevi permeson eldoni revuon. La redaktoro skribas:

"Aperigi revuon en lando kiel la nia similas naĝi kontraŭ fluadirekton. De longa tempo Irana esperantistaro suferis pro la manko de komunikilo kaj nun post longa procedado ni havas publikan tribunon kiu ebligas nin prezenti nian movadon al Irana socio.

Fakte ni celas du ĉefajn direktojn aperigante la revuon: informadi al la perslingva mondo pri E-o, E-movado kaj E-kulturo kaj prezenti Iranan kulturon al la E-mondo.

Nian agadon neniu subtenas kaj tute memstare kaj sendepende ni aperigas la revuon kaj tio signifas ke nia plua ekzisto forte dependos de akcepto de niaj unuopaj legantoj. Nia potenco ne estas tio kion vi konsideras! Mi bone konscias ke ankoraŭ restas multaj mankoj sur la paĝoj de nia revuo sed ni intencas ke ĉiu numere plibonigi la enhavon de la revuo, ĉu kvalite ĉu kvante."

La revuo enhavas plurajn artikolojn en la persa pri ekzemple E-movado en Irano, E-historio, instruado kaj Interreto. En la Esperanta parto estas i.a. artikoloj pri la historio kaj kulturo

de Irano, kaj prezentoj de iranaj esperantistoj.

Eblas aboni la revuon por 20 eŭroj jare (inkluzive aerpoŝta sendado). Pagu ĉe UEA al la konto: **iece-h**. Sciigu la redakcion pri via nomo, familia nomo, naskiĝjaro, profesio kaj adreso. La adreso de la redakcio estas:

Sabzandiŝan,  
P.O.Kesto 17765-184,  
Tehran, Iran.  
[info@sabzandishan.com](mailto:info@sabzandishan.com)

La portugala  
versio de  
"La nova latino  
de la eklezio"

'Esperanto: la nova latino de la Eklezio', estos lanĉata en la ĉi-jara librofoiro de Rio de Janeiro. La verko furoras en Germanio kaj jam estas tradukita en plurajn lingvojn. Ĝi priskribas la sintenon de kristanaj Eklezioj, ĉefe la Katolika, rilate al esperanto kaj montras la historian evoluon de la apogo al esperanto fare de Papoj kaj de Vatikano. Vere leginda! Foirejo: Rio-Centro, Rio de Janeiro Periodo: 17-a ĝis la 25-a de majo Loko: Pavilhão Vermelho, budo 37 Titolo: Esperanto, o novo latim da Igreja e do Ecu-menismo. Prezo: R\$20,00

Interrete en  
Sosnowiec –  
Pollando

Enkadre de postjubileaj iniciatoj celantaj popularigi Esperanton en 100-jara urbo Sosnowiec, lokaj esperantistoj kunlabore kun Urba Oficejo aranĝis interretajn dulingvajn ttpaĝojn invitante Polojn kaj tutmondan Esperantistaron al sekva adreso: [www.um.sosnowiec.pl/eo/](http://www.um.sosnowiec.pl/eo/) (t.e. esperantigitaj paĝoj pri Sosnowiec), [www.um.sosnowiec.pl/eo/klub/index\\_eo.asp](http://www.um.sosnowiec.pl/eo/klub/index_eo.asp) (t.e. paĝoj pri lingvo kaj esperantistoj). Arango de la paĝoj ne povus okazi sen informatika helpo de Redaktoro de 'Pola Esperantisto' – Kazimierz Leja kaj Sinjoro Adam Wilkus – studento pri informatiko, al kiuj mi kore dankas – A. Walaszek.

## DONACOJ

RONDO LANGLET Ĉiumonataj donacoj: Ingrid Göransson, Kalmar 200 kr; Leif Nordenstorm, Boden, 150 kr; Lenart Sundman, Västerås, 100 kr; Göran Lundgren, Stockholm, 100 kr; Tore Johansson, Kalmar, 100 kr; Signhild Johansson, Kalmar, 100 kr; Börje Andersson, Skövde, 100 kr; Bengt Nordlöf, Stockholm, 84 kr; Sten Anders Hannerz, Skotgås, 84 kr; Wim Posthuma, Västerås, 50 kr.

Se vi volas aliĝi al Rondo Langlet, kontaktu la SEF-kasiston Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-412205, e-poŝto: fredsa@artech.se

DONACOJ PRO UK Sten Broman, Skövde, 1500 kr; Nils Gustavsson, Linköping, 100 kr; Åke Waller, Umeå, 600 kr; Siv Sjögren, Kista, 500 kr; Tore kaj Signild Johansson, Kalmar, 1000 kr; Markki Tuonikoski, Virsbo, 200 kr; Yngve Sörman, Årsta, 200 kr; John Öhgren, Linköping, 100 kr; Dag Ellard, Ljungby, 1000 kr; Martin Persson, Orsa, 200 kr; Carl Rönnerberg, Västerfärnebo, 200 kr; Dagny Georgii, Enskededal, 200 kr; Wim Posthuma, Västerås, 250 kr;

## La svedaj esperantistoj kongresis en Skövde

La SEF-kongreso en Skövde estis malgranda sed intima kaj utila por la venonta UK en Göteborg. Ĝi estas ja preparata renkontiĝo por la Universala kongreso.

Ekzakte 40 partoprenantoj multon diskutis kaj cerbumis pri la UK en la kulturdomo de Skövde. Grave estis, ke ĉeestis la nova KKS de UEA, Clay Magalhaes.

Dum la SEF-jarkunveno Franko Luin reelektiĝis kiel SEF-prezidanto. Nova estrarano fariĝis Martin Stridh. Post 18 jaroj kiel kasisto Börje Andersson forlasis la estraron sed promesis resti kiel kasisto ĝis la fino de UK en Göteborg. La ekonomio montis etan profiton de 21 kronoj, sed pro la altaj kostoj de EsperantoCentro kaj La Espero la situacio daŭre estas malfacila. Estas vero ke la transigo de La Espero-presado al Skövde malaltigis tiun koston, sed anstataŭe la Poŝto tiel altigis la afrankokotizojn tiamaniere ke ili nun estas pli altaj ol la presad-kostoj!

Dum jaro 2002 ĝis nun 610 pagis por membreco, sed espereble venos ankoraŭ kelkaj.

Por la estonteco estas grave ke Kerstin Kristofersson donacis fondaĵon de 350 000 kronoj memore de sia mortinta edzo Nils-Erik. La fondaĵa sumo restu netuŝita, sed SEF rajtas uzi la jaran rentumon por edukado kaj informado.

Prizorgantoj de la kongreso estis Börje Andersson, Karl-Erik Ohlsson, Solveig Bertilsson kaj Carl-Gustav Gustavsson, sed al tiuj Skövde-anoj oni povas aldoni Wim Posthuma, kiu post la Västerås-kongreso pasintjare frue alvenis al Skövde por helpi kvazaŭ ia konstanta KKS.

Eldona Societo Esperanto, ILEI kaj SEJU havis ankaŭ jarkunvenojn dum la kongreso. En distra programo partoprenis Kaisa Hansen kun ekspozicia prezentado, kaj Odd Tangerud, Norvegujo kun sprita rakonto kaj la KKS Magalhaes per memoroj el sia hejmlando Brazilo. Neniu petis pri mona kontribuo por la prezentadoj. Odd eĉ kontraŭe donacis 100 kronojn. Tiamaniere la kongreso sukcesis havi etan profiton, 2058 kr.

Börje Andersson

## Anonco en Studentliv

En *Studentliv* (Studenta vivo, 175 000 ekzempleroj; specialaj numeroj en 250 000 ekzempleroj) de februaro kaj majo 2003 troviĝas anoncoj de SEF, laŭ decido dum antaŭa estrarkunveno. La revuo estas distribuata al ĉiuj universitataj studentoj; la specialaj numeroj krome al gimnazianoj de la lasta gimnazia jaro.

Att lära sig esperanto är att säga:  
"Jag är öppen för världen."  
**esperanto**  
Esperantoförbundet • Vikingagatan 24 • 113 42 Stockholm  
Tel. 08-34 08 08 • info@esperanto.se • www.esperanto.se

## Raporto de Esperanto-Centro

Ne estas novaĵo ke Esperanto-Centro, la oficejo de Sveda Esperanto-Federacio, ekzistas en Vikingagatan 24 en Stokholmo. Tamen tie okazas aferoj, pri kiuj oni povas rakonti.

Roland Lindblom proksimume kvarfoje jare aranĝas en EC intensan semajnfinan kurson. La meza nombro de partoprenantoj estas 5-6 personoj. La plej juna partoprenanto estis 11-12-jara. La plej maljunaj estis pensiuloj. Multaj havas dudekelk jarojn.

En interreto SEF proponas porkomencantan pakajon kun lerniloj kaj membreco en SEF. La ordinara mendanto estas 22-23-jarulo en universitata urbo, kiu konas neniu alian esperantiston. Li aŭ ŝi trovis informojn pri esperanto en interreto. En ok semajnoj en la komenciĝo de la jaro vendiĝis 13 porkomencantajn pakajojn.

En EC kunvenas ankaŭ rondo, kiu ellaboras Esperanto-svedan vortaron. En la vortara rondo kunlaboras i.a. Roland Lindblom, Bengt Jonsson kaj Roland Larsson. La laboro estas tre ĝenerale kleriga (*allmänbildande*). Grandan helpon donas Nationalencyklopedin kaj la nova german-Esperanta vortaro de Krause.

En EC renkontiĝas regule Esperanto-klubo de Stokholmo.

En EC okazas ankaŭ aliaj aferoj, pri kiuj rakontu aliaj.

Laŭ intervjuo kun Roland Lindblom  
Intervjuis Leif Nordenstorm

## 85 studentoj en Lesjöfors

En marto 85 lingvostudentoj el la universitato en Karlstad (Högskolan i Karlstad) vizitis Esperanto-Domon (Esperanto-Gården) por konatiĝi kun ĝi kaj kun Esperanto. Dum kelkaj horoj Lars Forsman instruis pri la fundamentoj de Esperanto. Oni povis ankaŭ rakonti ke Esperanto-Domo planas tutsemestran kurson ekde septembro ĝis decembro, se estos sufiĉa nombro da studentoj. Pri la vizito raportis tutpaĝe la gazeto Filipstads tidning.

## El Gotenburga kluba vivo

Vendrede la 24-an de januaro s-ro Lars Forsman vizitis la klubejon en Gotenburgo. Li nun estas pensiulo el sia ofico kiel instruisto ĉe la popolaltlernejo de Karlskoga. Li rakontis el sia multjara instruado en la Esperanto-programo de la lernejo kaj montris lumbildojn de la lernejo kaj de multaj lernantoj el tre diversaj landoj, kiuj frekventis lian kurson dum la jaroj. Li ankaŭ montris ekzemplon kiel li instruas kaj partoprenigis la aŭskultantaron en lecioneto, kio estis tre ŝata.

Marde la 18-an de februaro s-ino Anita Dagmarsdotter rakontis pri la kupra tempo de la sveda mindistrikto. La minaj trezoroj en la sveda mindistrikto ja estis la plej grava fonto de la sveda ekonomio dum la 17-18-a jarcentoj kaj financis la multajn militojn de la svedaj reĝoj. Kiam poste la kupraj trezoroj en la minejoj malgrandiĝis, tiel ankaŭ la militaj sukcesoj. Rilato ekzistis ankaŭ inter la kupro kiel eksporta varo kaj kiel materialo por svedaj moneroj. Kiam la kupra prezo estis malalta, oni uzis la kupron por grandegaj svedaj moneroj. Kiam la kupra prezo altiĝis, oni simple vendis la grandegajn monerojn eksterlande kiel metalan varon.

Ĉar ni samtempe festis la Semajnon de Internacia Amikeco, oni post la prelego skribis poŝtkartojn al diversaj esperantoamikoj kun salutoj de ĉiuj ĉeestantaj.

Laŭ Interligilo  
Andreas Nordström

## La tridekjara klubo en Västerås

Inger kaj Kjell Sjöberg, Götene, 500 kr; Anonima, 1000 kr; Jarl Hammarberg, V. Frölunda, 100 kr; Margreta Kettelheit, Oskarshamn, 100 kr; Sigurd Olsson, Strömsnäsbruk, 500 kr; Agnete Söllvander, Malmö, 200 kr; Samideano, Malmö, 1000 kr; Per Andersson, Mariestad, 100 kr; Rune Andersson, Skara, 200 kr; Lars Westman, Skövde, 200 kr; Ruben Enocson, Solna, 500 kr; Marianne Westman, Årsta, 1000 kr; Ernst Pilblad, Skövde, 100 kr; Gunvor Spector, Nynäshamn, 500 kr; Ingrid Ottosson, Vällingby, 500 kr; Lauri Rytkönen, Habo 500 kr; Yngve Sörman, Årsta, 1000 kr; Leif Holmlund, Skellefteå, 400 kr; Dolly Carlsson, Mölnlycke, 100 kr.

FONDUSO 70+ Ivar Nilsson, Umeå, 250 kr;

MEMORE DE ROLAND ERIKSSON Kaisa Hansen, Upl. Väsby, 200 kr.

MEMORE DE LENNART LAGERCRANTZ Kaisa Hansen, Upl. Väsby, 200 kr; Britta Rehm, Göteborg, 200 kr; Lisbet kaj Bertil Andreasson, 200 kr. CETERAJ DONACOJ Esperanto Stockholm, 6000 kr.

([www.quicknet.se/home/q-111060/eklubo.htm](http://www.quicknet.se/home/q-111060/eklubo.htm))

Tio estas la reteja adreso de la esperantista klubo en la urbo Västerås. La urbo situas 100 km okcidente de Stokholmo kaj estas la sesa (laŭ grandeco) urbo de Svedio (ĉ. 126.000 enloĝantoj).

La klubo havas nur 17 membrojn, la plej multaj estas sepdekplusjaruloj. Ĝi ne havas estraron, sed la aktivaj membroj kune organizas agadojn, kiuj estas laŭ la statutoj akceptitaj antaŭ 30 jaroj. La aktivaj membroj fakte ne havas tempon estrari, ankaŭ pro tio ke kelkaj eĉ ne loĝas en la urbo.

Helpas al ni nuntempe la retroŝta korespondado kaj kelkfoje eĉ la telefono. Se vere necesas renkonti por organizi ekzemple konferencon, ni faras tion dum la lunĉo en la laborejo de iu membro kiu ankoraŭ havas laboron.

Kiam necesas kunvoki pli da membroj, la respondeculo unue demandas kiuon dimanĉon (inter 2 aŭ 3 alternativaj) plaĉas al la plej multaj.

La klubkunvenoj ĉiam okazas dimanĉe 3 – 4 fojojn jare. Ne vespere de iu labortago, ĉar fakte kelkaj aktivaj membroj ne loĝas en Västerås.

La aliaj plej proksimaj kluboj troviĝas en Stokholmo, Upplands Väsby (80 km iom norde de Stokholmo) kaj Norrköping (150 km suden). La Esperanto-Domo en Vermlando situas 200 km nordokcidente.

La klubo ne havas propran klubojon, sed ni senpage uzas agrablan salomon kun kuirejo kiam ajn dum la jaro. Tiu ejo troviĝas en la studcentro de studorganizo. Tial ni ankaŭ povas lui teknikajn aparatojn por la kunveno. Ne estas tute senpaga, ĉar la klubo pagas 200 SEK/jare.

Tiu membreco donas multajn eblecojn. Ekzemple, kiam la Sveda Esperanto-Federacio aŭ alia organizo en nia nomo volas organizi konferencon, ni pagas 200 SEK/tage por pli granda salono kaj scenejo.

La klubo estas konata kiel organizanto de du Lingvaj Festivaloj, kiel la sola esperantista klubo en Svedio.

En 2004 eble la tria Lingva Festivalo samtempe kun la tridekjara jubileo. (Ĉi jare ni ne havas eblecon tion organizi pro la UK).

En 1990 la klubo estis kunorganizanto de la 3a Kultura Esperanto Festivalo.

Niaj radioprogramoj estis aŭdeblaj nur loke kaj iom ekster la urbo (la t.n. Proksimiradio).

En 1998 la radiaj programoj havis dekjaran jubileon. Poste ni daŭrigis unun jaron. Nun okazas radioprogramoj en la reto, kio ebligas, ke pli da samideanoj povas ilin aŭskulti.

En [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se) kaj poste je Rapida Elektro klakante 'Esperantorado Västerås' vi trovos nian plej freŝan radioprogramon pri la UK kaj la IJK kun novaĵoj kaj muziko. Ni uzas Real Audio-n. Katja Ignatieva kaj mi informas vin pri la nacia vespero kaj pri la virtuala kongresejo kaj pri multe pli. Bonvolu kontakti nin kion vi opinias pri la programo. Ĉu indas daŭrigi? Sukceson!

Dum la Jaro de la Europaj Lingvoj en 2001 la klubo malfermis serion da lingvaj- kaj kulturaj kunvenoj en la lernejo de enmigrantlingvoj. Membroj montris kio estas Esperanto.

En 2002 ni kunlaboris kun la komunumo Sölvesborg, kiu ne havas E-klubon, rilate al la donaco de memorŝtono kaj memorarbo en la Parko de la Mondo de la Pola urbo Malbork.

La klubo havas diversajn retpaĝojn: tri pri la klubo, radio-paĝon kaj pri la iama Lingva Festivalo.

Kiel la lasta noto: La klubo eldonas de tempo al tempo la *VEKA Bulteno*-n. La tri literoj estas la mallongigo de la klubano. Samtempe la vorto VEK vekas vin.

Wim Posthuma

## TEJO gajnis svedan retpremion

"TEJO ĵus gajnis premion de la sveda lingvoinstrua helpagentejo Tema Modersmål," feliĉas Chuck Smith, volontulo de TEJO en la Centra Oficejo. TEJO gajnis en la kategorio "Multlingva lernanta premio" pro siaj atingoj en la reteja multlingva edukada kreiveco. "Oni elektis nin ĉar niaj retpaĝoj estas publikigitaj en pli ol unu lingvo ofertante lingvotrejnajn eblecojn," fieras Hokan Lundberg, kunkreinto de la retejo tejo.org. "Tiu premio estas nia unua internacia honorigo por niaj interretaj klopodoj." Ankaŭ Smith ĝojas, "ke neesperanta organizo agnoskas nian laboron al nia celo por multlingva edukado.

Estis iom strange, ĉar mi rekomendis ke ili konsideru lernu.net por la premio, sed anstataŭe ili elektis tejo.org." Tema Modersmål celas ko-

lekti informojn kaj provizi eblecojn diskuti pri ĉio kaj kun ĉiu, kiu estas interesita pri gepatra lingva subteno, instruado de gepatraj lingvaj studoj.

Vidu la informon pri la premiitoj: <http://modersmal.skolutveckling.se/projekt> <http://www.modersmal.net/eschola>

## Pasita la nivelo 100 000 eLibroj

En la paska dimanĉo estis elŝutita la centmila elektronika libro en **eLibrejo**. La 'honoron' de tiu ronda cifero ricevis la e-libro 'Gulivero en Liliputo' de Jonathan Swift, lingve reviziita eldono de tre frua esperanto-traduko. Samtempe tiu estis la 431-a elŝuto de tiu titolo. Ĉiuj libroj en eLibrejo estas senpagaj kaj troveblas ĉe [www.esperanto.nu/eLibrejo](http://www.esperanto.nu/eLibrejo).

Por la UK en Gotenburgo estas preparata K-disko, kiu enhavos la elektronikajn librojn eldonitajn de Inko Eldonejo, iom pli ol 200. La K-disko estos aĉetebla ĉe la kongresa Libroservo.

Franko Luin

## Libera Folio furoras

La sendependa movada bulteno *Libera Folio* estis lanĉita la 12-an de aprilo. Tre rapide la retejo havis sian milan viziton. La tuja populareco de *Libera Folio* klare montras, ke novaj, sendependaj voĉoj estas bezonataj en la esperanta gazetaro.

En *Libera Folio* oni povas legi la komentojn de Claude Piron, Osmo Buller, Nikola Rašić kaj multaj aliaj konataj esperantistoj pri la lastatempaj okazajoj en UEA.

Legu ĉe <http://folio.xrs.net>.

Kalle Kniivilä

## Kie estas "La insulanoj"?


Upsala esperantisto Yngve Nilsson antaŭ sia morto tradukis la libron "Hemsöborna" de August Strindberg al Esperanto. Unu ĉapitro publikigis en SLEA-Infomilo. Ĉu iu scias kie troviĝas la manuskripto? Sciigu al la redaktoro de *La Espero*.



# La sveda klimato

Multaj eksterlandanoj kiuj ne vizitis Svedion pensas ke nia klimato estas ege malfavora. Espereble la partoprenantoj de la UK en Göteborg tamen trovos, ke ankaŭ en tiel norda latitudo, cetere la sama kiel ekzemple tiu de Churchill en norda Kanado, povas esti agrabla vetero. Por UK-vizitantoj kaj aliaj ni prezentas kelkajn faktojn pri la sveda klimato.

Plej malvarme estas en januaro aŭ apud la sudaj marbordoj en februaro kun averaĝa temperaturo inter 0°C en Falsterbo sur la plej sudokcidenta pinto de la lando kaj -17°C en kelkaj valoj oriente de Kiruna en Laponio, la plej norda sveda provinco. Foje la temperaturo tie falas sub -40°C, sed en suda Svedio ĝi nur malofte estas sub -20°C.



Valo apud Abisko en norda Svedio. Foto: Komunumo de Kiruna.

La printempo alvenas al la suda triono de la lando dum marto kaj al la nordaj partoj en aprilo aŭ en la montaroj apud la norvegia landlimo kaj en la plej norda parto de Laponio nur en majo. Sed kiam la printempo finfine alvenas al la nordo ĉio iras kun impona rapideco.

En majo la somero alvenas al plej suda Svedio, kaj tiam la diferenco inter nordo kaj sudo estas frapa. Dum

oni skias sur metroprofunda neĝkovrilo en Riksgränsen nordokcidente de Kiruna jam plene verdiĝis en Skanio, la plej suda sveda provinco.

Jam ekde la fino de majo la suno restas super la horizonto dum la tuta tagnokto en la plej norda parto de la lando, kaj en julio la varmo kulminas. Tiam la averaĝa temperaturo estas 15-17°C en la plej dense loĝataj regionoj, t. e. en suda Svedio kaj laŭlonge de la marbordo norden ĝis la finnlanda landlimo. En ceteraj loĝataj partoj ĝi estas 10-14°C, sed sur la plej altaj montpintoj, ĉ. 2000 m super la mar-nivelo, en norda Laponio nur 0°C. Ĝenerale la posttagmezaj temperaturoj en la somero estas ĉ. 5 gradoj pli altaj kaj la frumatenoj ĉ. 5 gradoj pli malaltaj ol la averaĝaj. En esceptaj okazoj tre varmaj ventoj atingas Svedion de suda aŭ orienta Eŭropo kun temperaturoj super 30°C en la tuta lando ekster la montaroj. Dum la tuta somero tamen nokta frosto povas okazi en malalta tereno de la okcidentaj partoj de norda Svedio.

Ekde la fino de septembro la temperaturo rapide malkreskas kaj meze de oktobro jam estas vintro kun averaĝa temperaturo sub nul en nordokcidenta Laponio. Dum la sekvantaj 8-10 semajnoj la vintro progresas suden tra la tuta lando, kaj plej norde ekde la unuaj tagoj de decembro la suno ne plu montras sin dum pli ol unu monato. La aŭtuno kaj la unua parto de la vintro ofte estas blovaj, ĉar tiam intensaj malaltoj atingas nian landon de la norda Atlantiko.

La averaĝa precipitajkvanto en la plejparto de Svedio estas 500-800 mm jare. La plej malgrandaj jaraj sumoj, ĉ. 300 mm, ni trovas en Abisko situata en valo de plej norda Laponio ŝirmita kontraŭ la malsekaj okcidentaj ventoj. Nur 30 km okcidente de Abisko, Riksgränsen ĉe la landlimo kontraŭ Norvegio, ricevas la trioblan sumon. En la sama regiono, sed ĉ. 100 km pli sude sur la eksponataj okcidentaj deklivoj de montoj Sulitelma kaj Sarek la jara kvanto estas la plej granda de la tuta lando aŭ ĉ. 2000 mm. Alia regiono kun granda pluvkvanto troviĝas sur la okcidentaj deklivoj de la altaĵo en suda Svedio. Tie oni ricevas ĝis 1200 mm jare, la plej granda kvanto de iu loĝata regiono de Svedio.

Plej multe pluvas en julio kaj aŭgusto, sed tio dependas ĉefe pri pli

forta intenso de la pluvoj dum la someraj monatoj. Efektive somere nur pluvas dum dekono de la tempo en preskaŭ la tuta lando, sed vintre duoble pli ofte.

En suda Svedio 10-25 procentoj de la precipitaĵo estas neĝo, dum en la mezaj kaj nordaj partoj ĝenerale 30-40 procentoj kaj en la altaj montaroj eĉ pli ol la duono de la averaĝa jara kvanto konsistas el neĝo.

Ĉe la marbordoj en suda Svedio la tero estas neĝkovrita dum malpli ol 50 tagoj jare, kaj la neĝo malofte kuŝas dum pli longaj periodoj ol kelkaj semajnoj. En norda Svedio la neĝkovrilo kutime restas dum la tuta vintro, do dum 5-7 monatoj. Ĝia dikeco plej ofte kulminas en februaro aŭ marto, sed en la montaro ĝenerale pli malfrue. La averaĝa maksimuma dikeco varias de malpli ol 20 cm en sudokcidenta Svedio ĝis multe pli ol unu metro en la montaroj apud Norvegio. Eĉ en Svedio, unu el la hejmlandoj de Sankta Nikolao, nur unu ĝis tri kristnaskoj el dek estas "blankaj" en la plej sudaj partoj, sed en la norda duono de la lando estas preskaŭ certe, ke la neĝo sufiĉas por sleda distribuo de la kristnaskaj donacoj.

Haldo Vedin

## Svedaj veterrekordoj

**Plej alta temperaturo:** 38° en Ultuna (apud Uppsala) 9 julio 1933 kaj Målilla (sudorienta Svedio) 29 junio 1947.

**Plej malalta temperaturo:** -53° en Malgövik (Laponio) 13 decembro 1941 kaj Vuoggatjålme (Laponio) 2 februaro 1966.

**Plej granda pluvkvanto dum unu tago:** 237 mm en Karlaby (plej suda Svedio) 6 aŭgusto 1960.

**dum unu monato:** 429 mm en Jormlien (norda Svedio apud Norvegio) januaro 1989.

**dum unu jaro:** 1631 mm en Åstrilt (sudokcidenta Svedio) 1998.

**Plej alta ventrapideco dum 10 minutoj:** 40 m/s sur Ölands södra grund (sudorienta Svedio) 17 oktobro 1967.

## Internacie en Gotenburgo



**Sten Johansson. Vojaĝo kun Katrina. Facila rakonto. Al-fab-et-o, 2002.**

Estas tre agrabla, interesa rakonto! En la centro estas Katrina, instruistino en lernejo en Gotenburgo, kun klaso kun multaj naciecoj de la tuta mondo, ekzemple Afriko, Belorusio, Irano Ĉilio, Finnlando kaj Grekio. Ŝi estas esperantistino.

En la klaso estas du knabinoj, Halina de Belorusio kaj Gloria de Afriko, kiuj estas tre, tre veraj kaj bonaj amikinoj. Ili pasigas multajn agrablajn horojn kune en la lernejo kaj ankaŭ en tempoj liberaj de lecionoj.

Bedaŭrinde Halina kaj ŝia patrino ne rajtas resti pli longe en Svedio. Subite unu tagon Halina ne alvenis al la lernejo. Granda malĝojo por Gloria kaj aliaj en la klaso kaj Katrina!

Post longa tempo Gloria ricevis bildkarton de Halina kun adreso en Varsovio. Granda meditado de Katrina rezultas en grava decido de Katrina: ŝi kaj Gloria veturos somere al Pollando en aŭto de Katrina.

En Pollando atendas multaj aventuroj. Interalie ili vizitis la Esperantoredakcion de Pola Radio. Tre grava vizito!

La temo estas bona en la rakonto, kaj la lingvo estas tre pedagogia.

Temas pri amikeco inter diversaj naciecoj. Ĝi montras, kiel la esperantistoj en la mondo bone helpas unu la alian.


Tiaj kontaktoj helpas al Katrina kaj Gloria trovi Halinan, kiu ne plu loĝas en Varsovio kun sia patrino. Ŝi nun loĝas en Bjalistoko, proksime al la limo de Belorusio.

La rakonto estas tre bona por ler-

ni necesajn vortojn, kiujn oni uzas en kutima vivo, kaj por kompreni praktike la necesan gramatikon, kaj grave: estas agrabla rakonto por legi!

Birgitta Ekvall

## Homaj rajtoj



**Leah Levin. Homaj Rajtoj. Demandoj kaj Respondoj. Ilustrita de Plantu. Tradukita de Edmund Grimley Evans. UEA. Rotterdam. 1998. 140 paĝoj.**

Grava paŝo en la historio de kreado de "Homaj rajtoj" realiĝis la 10-an de decembro 1948, kiam la ĝenerala asembleo de UN akceptis la universalan deklaron de homaj rajtoj. Tio okazis jam antaŭ pli ol kvindek jaroj. Ĉu la demando pri homaj rajtoj estas daŭre atentinda, aŭ ĉu homaj rajtoj estas tiel natura afero, ke oni ne plu devas atenti pri ili? La respondo estas la unua, sed tamen estas ĝojiga afero ke multaj homoj en kelkaj landoj ne multe interesiĝas, ĉar ili tiel al kutimiĝis al homaj rajtoj, ke ili opinias ke estas evidenta afero. Ĉiu homo legu la deklaron pri homaj rajtoj kaj konsci pri ĝia enhavo. Tiuj homoj, kiuj aparte interesiĝas pri la afero, legu ankaŭ la libron "Homaj Rajtoj. Demandoj kaj Respondoj." La libro tamen ne estas tute facila libro. La unua duono estas la malfacila parto, kiu diskutas la internacian juron pri homaj rajtoj. Ĝi estas aparte leginda por juristoj kaj por politikistoj.

La dua parto estas pli ĝenerale alirebla. Ĝi klarigas la enhavon de la 30 artikoloj en la universala deklaro pri homaj rajtoj. Tial ĝi estas leginda ne nur por juristoj kaj por politikistoj,

sed por ĉiu homo kiu interesiĝas pri justeco.

La libron pliinteresiĝas amuzaj ilustraĵoj, kiuj povas ridetigi la leganton, kvankam ne ĉiam temas pri ridetiga temo.

Leif Nordenstorm

## Leginda revuo

**SLEA Informilo. Revuo de Sveda Laborista Esperanto-Asocio.**

SLEA Informilo estas modesta revuo laŭaspekte, sed majesta laŭenhavo. Ĝi estas revuo tute sen bildoj, sed kun multe da tekstoj. La enhavo estas ĉefe maldekstre politika. Aperas multaj tradukoj el la svedlingvaj revuoj *Arbetaren* kaj *Metro*. Aperas ankaŭ citaĵoj el la interreta diskutgrupo SAT-diskuto@yahoo.com kaj iam raportoj el SAT-kongresoj.

La politikan enhavon mi ne recenzas, ĉar mi estas aktiva ano de la Popola partio (liberaluloj), kaj ŝajnas ke la anoj de SLEA ne estas. Mi tamen volas gratuli al SLEA pri ilia revuo, kaj rekomendas al esperantistoj legi ĝin.

Leif Nordenstorm

## Juda Saĝo



**Sigvard Feldbaum (red.) Juda Saĝo. Esperantigis: Leif Nordenstorm. Ilustraĵoj laŭ siluetaj tondadoj fare de Jehoshua Grossbard. Dua eldono, elektronika, ĉe: [www.esperanto.nu/eLibrejo](http://www.esperanto.nu/eLibrejo)**

La broŝuro kompilas laŭ temoj sufiĉe ampleksan kolekton de maksimumoj kaj kontemplaĵoj el la juda saĝo pli malpli ekde la unua jarcento p.K. Do ne temas pri bibliaj aŭ apokrifaj citaĵoj, sed Talmudaj kaj postaj. Ĉar la hebrea lingvo, pro sia naturo estas pli konciza en vortoj, nome en malpli da

## ANNONSER

Utkommer i november 2003. **Ju-disk visdom** (ny upplaga på svenska) är en vackert utformad bok med illustrationer i blått efter silhuettklipp av den israeliske konstnären Yehoshua Grossebard.

52 sid. 95 kr.

vortoj povas enpaki scion por kio Esperanto bezonas foje preskaŭ double pli da vortoj, la originalo ofte sonas pli trafa. Per tio mi ne deziras kritiki la tradukinton, ĉar li devis alfronti la malfacilan taskon redoni la enhavon kiel eble plej klare kaj koncize. Li sukcesis en tio. Tamen ni devas preni en konsideron, ke por konanto de la moderna hebrea lingvo, kiel mi, la granda parto de la materialo estas senpere alirebla kaj komprenebla, kvankam la tiama hebrea diferencis de la moderna.

Do entute la broŝuro estas tre grava por la esperanta literaturo kaj ĝi redonas gravajn maksimumojn, kiujn kleraj judoj kaj israelanoj ĝis hodiaŭ rigardas kiel gravan parton de siaj filozofia kaj lingva heredaĵoj.



\* La paĝoj de la elektronikaj libroj estas grandigeblaj ĝis la tuta larĝo de la ekrano (kaj preter ĝi, sed tio ne estas praktika), tiel ke la literoj povas fariĝi tre grandaj. La recenzisto evidente ne provis tiun eblecon.

Homoj kun malbona vidkapablo povas pli facile legi elektronikajn librojn ol presitajn, ĝuste pro la ebleco grandigi la literojn.

La malavantaĝo estas, ke oni estas devigata legi sur ekrano, kio ne estas same komforta kiel libro, kiun oni povas facile kunporti, ekzemple en la preferatan fotelon aŭ vespere en la liton.

(Noto de Franko Luin)

Mi ĵus pli funde trarigardis la retan version de *Juda saĝo* kaj mi konstatas ke la literoj estas tro malgrandaj\* kaj iom pene legeblaj, sed eble mi, 49-jara, kiu jam bezonas okulvitrojn por legado, ne tute estas objektiva. Sed ja la papera versio estas pli bone legebla kaj pli facile uzbla. Sed ĉar tiu versio elĉerpiĝis, ni devas esti kontentaj pri la elektronika, ĉar la libro estas grava fonto de diraĵoj de judaj saĝuloj, el kiuj ĉiuj povas profiti. Kio koncernas la ilustraĵojn, ili ĝenerale plaĉas al mi, ili neniun ofendas kaj ne donas malĝustan impreson. La kovrilpaĝo de la reta versio estas konsiderinde pli bela kaj plaĉa por la okuloj.

David Shamgar

Problemoj pri legado de elektronikaj libroj, ekzemple pri grandeco de literoj plej ofte dependas de nekutimo de la leganto aŭ pri malbonaj komputilaj programoj. (Mi mem spertis.)

Elektronikaj libroj cetere nuntempe ankaŭ estas registritaj en multaj gravaj bibliotekoj. Tial ni foje recenzos elektronikajn librojn ankaŭ en *La Espero*.

## Renkonto kun Edith – amata poetino!

**Edith Södergran:**  
**Lando malekzista.**  
**Esperantigis: Sabira Ståhlberg.**  
**Varna 1999.**

Edith Södergran estas nun tradukita en esperanton! Granda ĝojo! Estas lerte kaj sentoplene tradukita de Sabira Ståhlberg (N-ro 2 de Serio Kargo /Bambu Ltd, Varna 1999, Bulgario). La titolo de la libro estas "Lando malekzista".


Somere 1998 mi estis en studgrupo survoje de Helsingfors al Sankt Peterburgo, kaj ni havis ne atenditan eblecon viziti la vilaĝon Raivola, nuntempe ruslingve Rosjina. Estas la loko, kie Edith Södergran loĝis kune kun sia patrino Helena, kaj kie ŝi skribis grandan parton de siaj poemoj, kaj tie ŝi mortis en la hejmo nur 31-jara. La domo, kie ili loĝis, estas nuntempe malaperinta, sed de la ĝardeno oni havas belan vidon al lago Onkamo, al la apuda ortodoksa preĝejo kaj al la arbaro kun multaj specoj de arboj. En la ĝardeno estas skulptaĵo de ŝia ŝatata kato Totti, kun teksto de Edith Södergran en rusa lingvo.

En esperanto:

**Totti**

"Ne ĉiuj estaĵoj estas kreitaj esti tiel amataj"

Sten Johansson skribas en sia antaŭparolo al "Lando malekzista" ke



La domo, kie ili loĝis, estas nuntempe malaperinta, sed de la ĝardeno oni havas belan vidon al lago Onkamo, al la apuda ortodoksa preĝejo kaj al la arbaro kun multaj specoj de arboj.

li preferas "iam-tiam reveni al unuopaj poemoj por iom resti ĉe ili, kvazaŭ sur ŝatata loko en arbaro, ĉe lagobordo, apud klifo, sub la steloj"... Li skribas ke esperanto tre konvenas por interpreti la poezion de Edith Södergran. Li ankaŭ laŭdas Sabira Ståhlberg por ŝia traduko.

Mi konsentas kun Sten! Mi pensas ke esperanto tre konvenas por interpreti la poezion de Edith Södergran. Kelkaj linioj en "La arboj de mia infanaĝo":

"Nun la sekreton de via vivo volis ni diri:  
la ŝlosilo al ĉiuj sekretoj kuŝas herbeje en la frambodeklivo.  
La frunton vian volis ni puŝi, dormanto,  
ni volis veki vin, morta,  
el via dorm'."

Elmer Diktonius, amiko de Edith Södergran, skribis poemon "Memoro", kun Södergran kiel subtitolo. La poemo komenciĝas:


"Inter mallumaj piceoj rapidege elkreskis floro mirinda."

Estas tre vivanta portreto de tiu poetino kun kuraĝo kaj freŝo, ofte kun temoj amo kaj morto. Legu la poemlibron! Estas grandvaloraĵo poemoj kaj ili estas bonege tradukitaj!

Birgitta Ekvall

# Aktualaj eldonoj

## de eldonejo kun tradicio: ĉijare 85-jara




**Alfred Nobel: Nemeza/Nemesis. Tragedio en kvar aktoj.**  
 Tradukis: Gunnar Gällmo. Dulingva. 253 p.

248 SEK

La dum pli ol 100 jaroj kaŝita verko de Alfred Nobel, tiu de la famaj Nobel-premioj. En unika dulingva eldono sveda-esperanta. Pri la tragika sorto de juna nobelino en la papa Romo en la jaro 1598.

... kaj la ĉiam aktuala  
 Etimologia Vortaro de  
 Esperanto 1+2+3+4+5!



**La Dharmo-pado.**

Tradukis: Gunnar Gällmo. 110 p.

180 SEK

Unu el la bazaj libroj de la budhismo en eleganta traduko kaj bela bindo. Vivfilozofio valida dum ĉiuj epokoj. Aperas en la prestiĝa serio *Oriento-Okcidento*.

### Pliaj novaj titoloj en esperanto:

**Sten Johansson: Kion ajn.**


Facila rakonto.

60 SEK

Nova verko de unu el la plej produktemaj verkistoj kaj tradukistoj.



### Kaj kelkaj eldonoj en la sveda lingvo:




**Leif Nordenstorm: Ômotos mission på esperanto.**

220 p.

150 SEK

Doktoriga disertacio de la redaktoro de *La Espero*.



**Gunnar Gällmo: Kelkaj faktoj pri la budhismo.** 77 p. 85 SEK

Taŭga kompletigo de *La Dharmo-pado*, de la tradukinto de tiu verko.




**Leif Nordenstorm: Doktor Zamenhof och det internationella språket. En bok om esperanto och dess upphovsman.** 84 p. 120 SEK

Pri la iniciatinto de esperanto kaj liaj ideoj. Kun antaŭvorto de Daniel Tarschys, eksa ĝenerala sekretario de Eŭropa konsilantaro.

**Bertil Nilsson: Introduktion till esperanto.** 28 p. 25 SEK

Reeldono de kajero kun baza enkonduko al esperanto.



## Esperantoförlaget • Eldona Societo Esperanto

La indikitaj prezoj validas en Svedio ĉe Esperanto-Centro, Vikingagatan 25, 113 42 Stockholm, tel. 08-24 08 00 (retadreso: [ecentro@esperanto.se](mailto:ecentro@esperanto.se)) kaj ĉe la Libroservo de 88-a UK en Gotenburgo. Eventualaj sendkostoj aldoniĝas.